

Jacinto Benavente

Jacinto Benavente

La kreitaj profitoj

PULCINELA KOMEDIO

en du aktoj, tri partoj kaj unu prologo.

Unuafoje prezentita en la Madrida Teatro

Lara la 9^{an} decembro 1907

El la hispana lingvo, kun permeso de la aŭtoro,
tradukis

VICENTE INGLADA

Akademiano

ELDONITA DE

Hispana Esperanto Asocio


MADRIDO, 1932

Presejo: CHULILLA y ANGEL

To: recilla del Leal, 17

6

JACINTO BENAVENTE




Federación Española de Esperanto
Hispana Esperanto - Federacio

Rodríguez San Pedro 13 - 3º - 7, E-28015 MADRID
Tel. +34 - (91) - 4463079

La kreitaj profitoj

(DUAKTA KOMEDIO)

2429



Jacinto Benavente

Mariano 2/1/1907

La kreitaj profitoj

PULCINELA KOMEDIO

en du aktoj, tri partoj kaj unu prologo.


Unuafoje prezentita en la Madrida Teatro

Lara la 9^{an} decembro 1907

En la hispana lingvo, kun permeso de la aŭtoro,
tradukis

VICENTE INGLADA

Akademiano




DEDICÓ DE LA AŪTORO

Al Sinjoro Rafael Gasset

lia tre sindona,

JACINTO BENAVENTE



PERSONOJ

DONJA SIRENO.
SILVIO.
SINJORINO PULCINELO.
KOLOMBINO.
LAŬRA.
RISELA.
LEANDRO.
KRISPIN. *
LA DOKTORO.
PULCINELO.
ARLEKENO.
LA KAPITANO.
PANTALON. *
LA GASTEJMASTRO.
LA SEKRETARIO.
UNUA SERVANTO DE LA GASTEJO.
DUA SERVANTO.
UNUA JUGOSERVISTO.
DUA JUGOSERVISTO.

*La agado okazas en malreala lando, je la komenco de XVII
centjaro.*

(*) Oni elparolu : *Krispin'*, *Pantalon'* (la akcento sur lasta silabo).

rusan bawudâcon ≈ picara
hampar

altranguhinon ≈ danna de
calidad.

Budo = mierbo, samplete, larraca
o tienda: no lujosa de maderas
y tablas.

¿Podría usarse como tinglado?

En estas la budzangja de la
antikwa farsos, ---

o sería quizá mejor

En estas la samgahudo ~~por~~
de la antikwa farsos, ---

Pariano de T. T. T.

PROLOGO

Kurteno en la scenejantaŭo. En ĝia mezo pordo kun drapiraĵo. La prologo estas deklamita de la persono KRISPIN.

KRISPIN

Jen estas la lokŝanĝa prezentejo de la antikva farso, kiu en vilaĝaj voĝgastejoj mildigis laciĝon de la komercaj disportistoj. En la placo de humilaj vilaĝetoj ĝi mirigis la simplanimajn malnobelajn kaj en multdomaj urboj ĝi kunigis la plej diversajn ĉeestantarojn, kiel okazis en Parizo sur la Nova Ponto, kiam Tabarin, el sia foira antaŭtrabaĵo petis pri atento ĉiujn preterirantojn, same la seriozafektan doktoron, kiu aŭdinte spritaĵon el la gaja farso, haltigas unuminute sian kleran rajdobeston por momente sensulkigi sian frunton, ĉiam ŝargitan de gravaj pensoj, kiel la ruzan bravulaĉon, kiu tie amuzadas sian nelaborecon dum horoj kaj horoj, distrante per la rido sian malsaton, same la prelaton kaj la altrangulinon, kaj la nobelojn ĉe iliaj kaleŝoj, kiel la facilaniman junulinon kaj la soldaton, la komerciston kaj la studenton. Ĉiuklasaj personoj, kiuj aliloken ne estus kunvenintaj, tie komunikis unu al la alia sian videblan ĝojon, kaj multfoje la seriozulo ridis, pli ol pro la farso mem, ĉar li vidis ridanta la gajulon, kaj la saĝulo—la simplanimulon, la malriĉulojn aŭdante la ridon de la grandsinjoroj, ordinare kun frunto koler-sulka, kaj la noblajn sinjorinojn pro la rido de la malriĉaj, sentante ke ilia konscienco ekkvietiĝas per la penso: ankaŭ la malriĉuloj ridas! Nenio ja ŝoveniĝas el unuj animoj en aliajn, kiel tiu ĉi simpatio de ridado. Ankaŭ la farso supreniris la palacojn de princoj, plejaltrangaj sinjoroj, pro humordecido de iliaj mastroj kaj tie la farso ne estis malpli libera kaj senzorga. Ĉies ĝi estis kaj por ĉiuj. El la popolo ĝi kolektis mokojn kaj malicaĵojn kaj kvazaŭ sentencajn dirojn, el tiu filozofio de la ĉiamsuferaj popolo, maldigita per la rezignacio de la tiamaj humiluloj, kiuj ne dion esperante de ĉi tiu mondo, scii ridi pri la mondo sen-

mildigita

malame kaj senamare. Lope de Rueda, Shakespeare kaj Molière glorigis poste la plebecan devenon de la farso per nobela titolo : kiel enamitaj princoj ĉe fabeloj pri feinoj ili levis Cindrulinon en la plej altan tronon de Poezio kaj Arto. Pri tiel glora praradiko ne afektas tiu ĉi farso, kiun hodiaŭ poeto prezentas al vi pro scivolemo de sia malkvieta spirito. Ĝi estas marioneta farso kun sensenca priafero, sen ia ajn realeco. Vi konstatos baldaŭ, ke ĉio en ĝi okazanta, neniam povis okazi, ke ĝiaj personoj ne estas, nek ŝajnas viroj kaj virinoj, sed nur marionetoj aŭ homfiguretoj el kartono kaj ŝtofpecoj, kun maldelikataj tirtfadenoj, videblaj de miopegulo ĉe malhela fumo. Tio estas la samaj groteskaj gemaskitoj de tiu komedio de la itala Arto, ne tiel ĝojaj, kiel ili kutimis esti, ĉar ili multe meditadis en tia longa intertempo. La aŭtoro ja scias, ke tiel primitiva spektaklo ne estas plej inda je klera nuntempa aŭdantaro : tial li sin ŝirmas tiom per via kultureco, kiom per via boneco. La aŭtoro nur vin petas, ke vi reinfanigu vian spiriton plej multe, kiel eble. La mondo estas jam maljuna kaj petolumas : Arto ne rezignacias maljuniĝi kaj por sin montri infano ŝajnigas balbutadon... kaj jen kial tiuj ĉi maljunaj pulĉineloj hodiaŭ pretendas amuzi vin per siaj infanaĵoj.

S A N Ĝ O

P A R T O U N U A

Placo de urbo. Dekstre kaj antaŭloke, facado de gastejo kun efektiva pordo kaj sur ĝi frapilego. Supre de la pordo anoncoskribo diranta : «Gastejo».

S C E N O U N U A

LEANDRO kaj KRISPIN, kiuj venas el maldekstre, mezoloke.

LEANDRO

Tiu ĉi devas esti granda urbo, Krispin ; per ĉio vidiĝas ĝia sinjoreco kaj riĉeco.

KRISPIN

Estas du urboj. Plaĉu al la Ĉielo, ke ni entrafu la plej bonan.

LEANDRO

Du urboj, vi diras, Krispin ? Nu, mi komprenas, la malnova kaj la nova, unu, antaŭ la rivero, la alia transe.

KRISPIN

Por kio grava la rivero, nek malnoveco, nek noveco ? Mi diras du urbojn, kiel en ĉiuj urboj el la mondo : unu por la alvenanto kun mono, kaj alia por kiu alvenas, kiel ni.

LEANDRO

Tro multe valoras alveni, ne renkontinte la juĝistaron ! Kaj mi ja volus haltadi ĉi tie kelkan tempon, ĉar jam lacigas min tia longa migrado.

KRISPIN

Ne min, ĉar estas karaktero de la naskitaj, kiel mi, en la libera reĝlando Ruzujo, ne fari restadon en iu ajn loko, se ĝi ne estas devigita ĉe pungalero, kiu estas tre malmola restado. Sed ĉar ni falis en tiun ĉi urbon kaj ĝi laŭvideble estas urbo kun fortikaĵoj, ni pripensu, kiel singardemaj kapitanoj, nian batalan planon, se ni devas konkeri ĝin profite.

LEANDRO

Ni estas veninta armeo ne taŭge alprovizita !

KRISPIN

Viroj ni estas kaj kontraŭ viroj ni devas agadi.

LEANDRO

Kiel tutan monharon, nian personon. Vi ne volis, ke ni senigu nin je tiuj ĉiuj vestoj, kiuj malbonvendite estus liverintaj al ni kelke da mono.

KRISPIN

Preferinde mi senigus min je haŭto, ol je bona vesto ! Nenio tiel grava, laŭ la monda opinio, kiel belŝajni, kaj la vesto estas la unua, kiu elvidiĝas.

LEANDRO

Kion ni faros, Krispin ? La malsato kaj laceco estras min senkuraĝa kaj mi malbone pripensas.

KRISPIN

Tie ĉi nur efikos helpi al si per sprito kaj senhonteco, ĉar sen tiu ĉi neniel taŭgas sprito. Kion mi pensis, tio estas, ke vi parolu malofte kaj malafable por mieni kiel bonranga persono ; iam post iam mi permesas, ke vi frapu baton sur mian dorson ; pri ĉio al vi demandita respondu misterece ; kaj se vi propre vole ion diros, parolu serioze, kvazaŭ vi kondamnis. Vi estas juna kaj belvidiĝa ; ĝis nun vi nur sciis malbonuzi viajn kvalitojn ; jam estas horo ilin profitigi. Lasu vin en miajn manojn, ĉar nenio plitaŭgas al viro, kiel iun konduki siaflanke, kiu rimar-

kigadas liajn meritojn, pro tio, ke ĉe si mem modesteco estas malsaĝaĵo, sinlaŭdo—frenezo, kaj per ambaŭ oni perdas por la mondo. Ni, viroj, estas komercaĵo, valoranta pli aŭ malpli laŭ la lerteco de la vendisto nin prezentanta. Mi certigas, ke se eĉ vi estus vitraĵo, mi devas zorgi, ke oni kredu vin diamanto. Kaj ni voku en tiun ĉi gastejon, ĉar la unua afero estas stari tendare je la vido de la militurbo.

LEANDRO

Ĉu vi diras en la gastejon? Kaj kiel ni pagos?

KRISPIN

Se vi tiel bagatele malkuraĝiĝas, ni serĉu hospitalon aŭ azilon, aŭ ni almozpetu, se ni helpas al ni per pieco; kaj se per braveco ni reiru al la vojo kaj tie rabataku la unueviditan preteriranton, se ni tenas nin al la realeco de niaj rimedoj, ne aliaj estas niaj rimedoj!

LEANDRO

Mi portas prezentajn leterojn por influaj personoj el tiu ĉi urbo, kiuj povos helpi al ni!

KRISPIN

Tuj disŝiru tiujn leterojn kaj ne pensu pri tiaj hontigaĵoj! Prezenti nin al iu, kiel bezonuloj! Bonkreditaj estas ja tiaj skriboj! Hodiaŭ oni akceptos vin per granda ĝentileco, oni diros al vi, mia domo kaj persono estas viaj, kaj la duan fojon, kiam vi frapos sur la saman pordon, la servisto jam diros al vi, ke lia mastro ne estas en domo, nek restas en ĝi, kaj ĉe nova alvizito, oni eĉ ne malfermos al vi la pordon. Tiu ĉi estas mondo por «prenu kaj donu», halo de kontraktado, domo de interŝanĝoj, kaj antaŭ ol peti, oni devas proponi.

LEANDRO

Kion mi povos proponi, havante ja nenion?

KRISPIN

Kiel malmultpreze vi taksas vin! Nu, do, ĉu viro per si

nenion valoras? Viro povas esti soldato kaj per sia braveco decidigi la venkon; li povas esti amindumisto aŭ edzo kaj per dolĉa kuracilo resanigi bonrangan sinjorinon aŭ nobelan knabinon, kiu sentas sin mortanta de melankolio; li povas esti servanto de potenca sinjoro, kiu korinkluniĝas al li kaj levas lin ĝis sia plenkonfideco, kaj multaj aferoj pli, kiujn mi ne laŭvicesprimos. Por supreniri, kia ajn ŝtupo taŭgas.

LEANDRO

Kaj se eĉ tiu ŝtupo mankas al mi?

KRISPIN

Mi proponas al vi mian dorson por althonoriĝi. Vi vidos vin suprenlokita.

LEANDRO

Kaj se ni ambaŭ falas teren?

KRISPIN

Tio ne estu al ni tre domaĝe! (*Frapante en la gastejon per la pordofrapilo.*) Eliru, gastejmastro! Venu, mi rediras! Gastejmastro aŭ demono! Ĉu neniu respondas? Kia estas tiu ĉi domaĉo?

LEANDRO

Kial tiuj alkrioj, se vi apenaŭ ekfrapis?

KRISPIN

Ĉar estas malnoble atendigi nin tiamaniere! (*Refrapas pli forte.*) Venu, gastejmastro! Eliru, domanoj! Venu ĉiuj diabloj!

GASTEJMASTRO

(*Interne.*) Kiu vokas? Kiaj krioj kaj ĝentilaj manieroj tio estas? Vi ja ne atendis tiel longe.

KRISPIN

Longe ja estis! Kaj oni ĝuste informis min, ke tiu ĉi estas tre malŝatinda vojkastejaĉo por nobelaj personoj.

SCENO II

La samaj, la GASTEJMASTRO kaj du SERVANTOJ, kiuj eliras el la gastejo.

GASTEJMASTRO

(Elirante.) Zorgu pri viaj diroj, ĉar tio ne estas vojkastejaĉo sed gastejo kaj en ĝi loĝis tre grandaj sinjoroj.

KRISPIN

Tiujn mi volus vidi, kiujn vi nomas grandaj sinjoroj. Iuj malriĉaj diabloj, sendube. Tio ja konstatigis per tiuj servistoj, kiuj ne scias trafdistingi la altrangajn personojn kaj tie staras, kiel idiotaj senmovuloj, ne zorgante nin servi.

GASTEJMASTRO

Per la diablo, kiel vi estas impertinenta!

LEANDRO

Tiu ĉi mia servanto ĉiam plejigas sian fervoron. Taŭga estas via gastejo dum la mallonga tempo, kiun mi restos en ĝi. Prestigu tuj ĉambron por mi kaj alian por mia servanto kaj ni ŝparu la vortojn.

GASTEJMASTRO

Pardonu, Sinjoro; se vi estus antaŭe parolinta... Ĉiam la mastroj estas ja pli afablaj, ol la servantoj.

KRISPIN

Ĉar tiu ĉi bona mastro mia alkonformiĝas al ĉio; sed mi scias, kio decas al lia servado kaj ne toleros aferon malbonfartan. Konduku jam nin en la ĉambron.

GASTEJMASTRO

Ĉu vi portas nenian pakaĵon?

KRISPIN

Ĉu vi pensas, ke nia pakaĵo estas porvoja provizaĵo el soldato aŭ studento, kiun oni manportas, kaj ke mia mastro povas

tien ĉi venigi ok ĉarojn, kiuj postiras nin, kaj li restos ĉi tie pli longe, ol postulos la sekreto de la komisiitaj al li aferoj?

LEANDRO

Ĉu vi ne silentos? Kiu sekreto estas ebla kun vi? Nu, mi ĵuras per... se iu mallkovros min pro via senmezura babilado!...
(*Minacas kaj batas lin per sia glavo.*)

KRISPIN

Helpu al mi, li min mortigos! (*Kurante.*)

GASTEJMASTRO

(*Sin metante inter Leandro kaj Krispin.*) Detenu vin, Sinjoro!

LEANDRO

Lasu ke mi lin punu, ĉar nenia pli granda difekto estas por mi, ol paroli sen saĝeco!

GASTEJMASTRO

Ne punu lin, Sinjoro!

LEANDRO

Lasu, lasu min, se ne li lernos neniam. (*Tuj batonte Krispin'on, ĉar tiu ĉi kaŝas sin post la Gastejmaŝtro, li nevole frapas la Gastejmaŝtron.*)

KRISPIN

(*Plendante.*) Aj, aj, aj!

GASTEJMASTRO

Aj, mi ja diras, mi, kiu pliate ricevis la batojn!

LEANDRO

Vidu, kion vi okazigis, ke tiu ĉi senkulpulo estis la batato. Petu de li pardonon!

GASTEJMASTRO

Ne estas necese. Mi volonte pardonas lin. (*Al la Servistoj.*) Kion vi tie faras senmovaj? Pretigu la ĉambraron, kie kutimas

loĝadi la Mantua imperiestro kaj preparu la manĝon por tiu ĉi kavaliro.

KRISPIN

Lasu, ke mi rimarkigu ĉion al ili, se ne ili faros mil malfertaĵojn kaj mi poste pagos, ĉar mia mastro, kiel vi vidis, pardonas nenian maltaŭgaĵon... Mi iras kun vi, knaboj... Kaj atentu tiun, kiun vi servas, ĉar la plej granda bonsorto aŭ la plej granda malfeliĉo transpaŝis hodiaŭ viajn pordojn. (*La Servistoj kaj Krispin eniras en la gastejon.*)

GASTEJMASTRO

(*Al Leandro.*) Kaj ĉu vi povas diri al mi vian nomon, el kie vi venas kaj por kia celo?...

LEANDRO

(*Vidante Krispin'on elirantan el la gastejo.*) Mia servanto raportos al vi... Kaj eklernu ne tedĝeni min per viaj demandoj... (*Eniras en la gastejon.*)

KRISPIN

Belan maltrafon vi ja faris! Maltimi demandi mian mastron! Se estas grave al vi, ke li loĝu eĉ unu solan horon en via domo, ne ree parolu al li.

GASTEJMASTRO

Eksciuj, ke estas tre severaj urbleĝoj, kiuj ordonas tion.

KRISPIN

Venu kun urbleĝoj al mia mastro! Silentu, silentu, vi ne scias, kiu loĝas en via domo, kaj se vi scius ĝin, vi ne dirus tion da impertinentaĵoj.

GASTEJMASTRO

Sed, ĉu mi eĉ ne ekscios...?

KRISPIN

Mi ĵuras per... mi vokos mian mastron, kaj li diros al vi tion, kio taŭgas, se vi ne ĝin komprenis! Zorgu, ke nenio manku

al li kaj atentu lin per viaj kvin sentoj, ĉar alie vi ja pentus!
Ĉu vi ne scias kontraŭi la personojn? Ĉu vi ne vidis ankoraŭ,
kiu estas mia mastro? Kion vi rediras? Nu, ni eniru! (*Eniras
en la gastejon enpuŝante la Gastejmastron.*)

SCENO III

ARLEKENO kaj la KAPITANO, kiuj venas el maldekstre mezoloke.

ARLEKENO

Vagante sur la kampoj, ĉirkaŭantaj tiun ĉi urbon, ni, sendube la plej meritoplenaj el ĝi, senpense, troviĝas mi kredas, antaŭ la gastejo. Kutima besto estas la viro! Kaj peniga kutimo sin nutri ĉiutage.

KAPITANO

La dolĉa muziko de viaj versoj deturnis min de miaj pensoj!
Aminda privilegio de poetoj!

ARLEKENO

Kiu tamen ne malhelpas, ke ĉio al ili manku! Kun timo mi alvenas al gastejo. Ĉu hodiaŭ oni pruntedonos al ni? Helpu al ni via glavo!

KAPITANO

Ĉu mia glavo? Mia soldata glavo, kiel via poeta liro, nenion valoras en tiu ĉi urbo de vendistoj kaj negocistoj... Malfeliĉa estas nia virostato!

ARLEKENO

Vi prave diras. Ne la superbela poezio, kantanta nur pri noblaj kaj altcelaj aferoj; eĉ ne taŭgas submeti la talenton je la piedoj de la potenculoj por ilin laŭdi aŭ prisatirigi; aplaŭdoj aŭ kritikegoj ne valoras por ili; nek ili dankas la unuajn, nek timas la duajn. Aretino mem estus nuntempe mortinta de malsato.

KAPITANO

Kaj ĉu ni, diru al mi? Ĉar ni estis venkitaj en la lastaj militoj, malpli de la potencaj malamikoj, ol de tiuj neindaj vendistoj, kiuj regadas nin kaj sendis nin defendi iliajn profitojn sen forto kaj sen entuziasmo, ĉar neniu batalas kun fido por tio, kion li ne estimas; ili, kiuj ne donis eĉ unu el si, kiel soldaton, nek ellasis monon sen bona procento kaj pli bona profito, kiuj apenaŭ timis ĝin perdi, minacis helpi al la malamiko, nun ili kulpigas nin, malkarese traktas kaj malŝatadas nin kaj eĉ volus ŝpari al si la mizeran salajron, per kiu ili kredas pagi al ni, kaj tre volonte nin forpelus, se ili ne timus, ke iam la prematoj per ilia malboneco kaj tiraneco ribelos kontraŭ ili. Ve al ili, se tiam ni rememoras en kiu flanko estas la praveco kaj justeco!

ARLEKENO

Se estus tiel... tiam mi restus ĉe via flanko.

KAPITANO

Kun la poetoj oni povas kalkuli por nenio, ĉar via spirito estas kiel opalo, kiu ĉe nova lumo, faras malsaman rebrilon. Hodiaŭ vi ekamegas tion, kio naskiĝas kaj morgaŭ kio mortas; sed vi estas pli inklinaj ŝategi ĉion ruiniĝan, pro ĝia melankolieco. Kaj ĉar vi estas personoj tranoktevagantaj, pli da fojoj vi vidis la sunon subirantan, ol ekleviĝantan kaj pli scias pri sunkuŝiĝoj, ol pri ektagiĝoj.

ARLEKENO

Tion vi ne diros por mi, kiu vidis ektagiĝi multajn fojojn, ne havante loĝejon kien kuŝiĝi. Kiel, do, vi volus, ke mi kantu pri la tago, gaja kiel alaŭdo, se ĝi eklumiĝis por mi tiel malgaja? Ĉu vi decidiĝas ekprovi la ŝancon?

KAPITANO

Kiel fari alie? Ni sidiĝu kaj okazu, kio ordonos nia bona gastejmastro.

ARLEKENO

He, venu! Kiu servas? (*Vokante en la gastejon.*)

SCENO IV

La samaj, la GASTEJMASTRO. Poste la SERVISTOJ, LEANDRO kaj KRISPIN, kiu siatempe eliros el la gastejo.

GASTEJMASTRO

Ha, kavaliroj! Ĉu tio estas vi? Mi tre bedaŭras, sed hodiaŭ mi povas nenium servi en mia gastejo.

KAPITANO

Kaj pro kia kaŭzo, se ĝi estas sciebla?

GASTEJMASTRO

Belan malembarason vi montras, ĝin demandante! Ĉu vi pensas, ke iu pruntedonas al mi, kion mi elspezas en mia domo?

KAPITANO

Ha, ĉu tiu estas la kialo? Ĉu ni ne estas kreditindaj personoj al kiuj oni povas pruntedoni?

GASTEJMASTRO

Por mi, ne. Kaj ĉar mi neniam kredis, ke vi pagu al mi, kiel favoron mi jam suffiĉe faris; tiel, do, bonvolu neniam reveni en mian domon.

ARLEKENO

Ĉu vi kredas, ke ĉio estas mono en tiu ĉi malnobla mondo? Ĉu vi neniel taksas la trolaŭdojn, kiujn ni faris ĉie pri via domo? Eĉ unu soneton mi dediĉis al vi, kaj per ĝi mi gloras viajn stufitajn perdrikojn kaj viajn pasteĉojn el leporviando!... Kaj rilate Lian Kapitanan Moŝton, estu certa, ke li sola subtenos kontraŭ armeo la bonfamon de via domo. Ĉu tio ĉi valoras nenion? Ĉu nur akcepti en la mondo la kontantan monon?

GASTEJMASTRO

Mi nun ne ŝatas mokojn! Mi ne bezonas viajn sonetojn, nek la glavon de Sinjoro Kapitano, kiun li pli taŭge povus uzi.

KAPITANO

Mi ĵuras per... ke mi ja uzos ĝin por punkorekti friponon.
(*Minacante kaj batante lin per la glavo.*)

GASTEJMASTRO

(*Kriante.*) Kion vi faras? Kontraŭ mi? Helpon! Justecon!

ARLEKENO

(*Detenante la Kapitanon.*) Ne perdu vin pro tiu malnobla estaĵo!

KAPITANO

Mi lin mortigos. (*Batante lin.*)

GASTEJMASTRO

Helpon! Justecon!

SERVISTOJ

(*Eliras el la gastejo.*) Oni mortigas nian mastron!

GASTEJMASTRO

Helpu al mi!

KAPITANO

Eĉ unu mi ne lasos kun vivo!

GASTEJMASTRO

Ĉu neniu venos?

LEANDRO

(*Kiu eliras kun Krispin.*) Kio estas tiu ĉi bruego?

KRISPIN

En domo, kie loĝas mia mastro? Ĉu kvieteco estas neebla en via domo? Mi venigos la juĝiston, kiu ĉion ordarangos.

GASTEJMASTRO

Tio ĉi estos mia ruino! Kaj tia granda Sinjoro en mia domo!

ARLEKENO

Kiu li estas?

GASTEJMASTRO

Ne maltimu demandi tion!

KAPITANO

Pardonu, Sinjoro, se ni interrompis vian ripozon; sed tiu ĉi malnobla gastejmastro...

GASTEJMASTRO

Mi ne estis kulpa, Sinjoroj, sed tiuj ĉi senhontuloj...

KAPITANO

Ĉu mi senhontulo? Mi nenion respektos!...

KRISPIN

Haltu, Sinjoro Kapitano, jen vi havas, kiu kontentigos viajn ofendojn, se tiu ĉi viro ilin faris al vi!

GASTEJMASTRO

Figuru al vi, ke jam pli longe, ol unu monaton ili manĝadis en mia domo, ne paginte eĉ unu moneron, kaj ĉar hodiaŭ mi rifuzis ilin servi, ili ribelis kontraŭ mi.

ARLEKENO

Ne mi, kiu ĉion elportadas pacience.

KAPITANO

Kaj ĉu estas prave, ke oni ne fidus al la kredito de soldato?

ARLEKENO

Kaj ĉu prave, ke oni neniel ŝatas unu soneton kun aldonitaj versoj, kiun mi verkis gloriante liajn stufitajn perdrikojn kaj liajn pasteĉojn el leporviando? Ĉion nur pro fido, ĉar mi neniam ekmanĝis ilin, sed ŝafajon kaj legomaĵon.

KRISPIN

Tiuj ĉi du noblaj Sinjoroj diras tre prave, kaj estas neinde trakti poeton kaj soldaton tiamaniere.

ARLEKENO

Ha, sinjoro, vi estas grandanima!

KRISPIN

Mi ne, sed mia mastro, pro sia grandsinjoreco, nenion trovas en la mondo pli taŭga, ol poeto kaj soldato.

LEANDRO

Vere.

KRISPIN

Kaj estu certa, ke dum mia mastro restos en tiu ĉi urbo, nenio mankos al vi ambaŭ kaj ĉion, kion vi elspezos, li pagos.

LEANDRO

Certe.

KRISPIN

Kaj la gastejmastro tre zorgu pri tio: trakti vin, kiel decas.

GASTEJMASTRO

Sinjoro!...

KRISPIN

Kaj ne estu tiel avara pri viaj perdrikoj kaj pasteĉoj el katviando, ĉar ne estas prave, ke tia poeto, kiel Sinjoro Arlekeno, songe parolas pri aĵoj tiel palpeblaj...

ARLEKENO

Ĉu vi konas mian nomon?

KRISPIN

Mi ne; sed mia mastro, kiel altranga Sinjoro, konas ĉiujn ekzistantajn kaj ekzistintajn poetojn, se nur ili estas indaj je tiu nomo.

LEANDRO

Certe.

KRISPIN

Kaj neniŭ tiel granda, kiel vi, Sinjoro Arlekeno; kaj ĉiŭfoje kiam mi pensas, ke tie ĉi oni ne elmontris al vi la tutan respekton, kiun vi meritas...

GASTEJMASTRO

Pardonu, Sinjoro. Mi servos lin, kiel vi ordonas, kaj sufiĉas, ke vi estas lia garantianto...

KAPITANO

Sinjoro, se per io mi povas vin servi...

KRISPIN

Ĉu estas malgranda servo nur koni vin? Glora Kapitano, ĉi estas kantita de tiu ĉi sola poeto!...

ARLEKENO

Sinjoro!

KAPITANO

Sinjoro!

ARLEKENO

Kaj ĉu miaj versoj estas al vi konataj?

KRISPIN

Ĉu konataj? Plej konataj, kiel eble! Ĉu ne estas via tiu mirinda soneto, kiu komenciĝas:

«La milda man', kiu karese ravas.»

ARLEKENO

Kiel vi diras?

KRISPIN

«La milda man', kiu karese ravas.»

ARLEKENO

Ĉu tiel ĝi komenciĝas? Ne, tiu soneto ne estas mia.

KRISPIN

Nu, ĝi meritas esti via. Kaj pri vi, Kapitano, kiu ne konas viajn famheroaĵojn? Ĉu tio ne estis vi, kiu nur kun dudek soldatoj atakprenis la kastelon de la Ruĝaj Rokoj en la fama batalo apud la Nigraj Kampoj?

KAPITANO

Ĉu vi scias?...

KRISPIN

Ni ja plej bone scias. Ho, kiomfoje mi aŭdis raporti entuziasme pri ĝi mian mastron! Dudek soldatoj kaj vi antaŭe, kaj de supre, el la kastelo... bum! bum! bum! pafojn, bomb-ojn, bolantan peĉon kaj brulantajn diablojn... Kaj viaj dudek soldatoj ĉiam kune antaŭen kaj vi antaŭ ili! Kaj el supre: bum! bum! bum! Kaj la tamburoj... ran', rataplan', plan'! Kaj la trumpetoj... tarari', tari', tari'!... Kaj viaj soldatoj, ĉiu nur kun sia glavo kaj vi sen glavo... ris, ris, ris! frapon tien! baton ĉi tien!... unu kapon for, unu brakon!... (*Komencas platfrapi per sia glavo la Gastejmastron kaj Servistojn.*)

SERVISTOJ

Aj, aj!

GASTEJMASTRO

Detenu vin, vi flamiĝas kvazaŭ tio estus okazanta!

KRISPIN

Kiel ne flamiĝi? Mi ĉiam sentis la *animus belli*.

KAPITANO

Nur ŝajnas, ke vi ankaŭ alestis.

KRISPIN

Aŭdi ĝin raportatan de mia mastro, estas same, kiel vidi ĝin, pli bone ankoraŭ, ol ĝin vidi. Kaj tian soldaton, la heroon de la Ruĝaj Rokoj ĉe la Nigraj Kampoj oni traktas tiamaniere!... Ha! Granda sorto, ke mia mastro ĉeestis, ke gravaj aferoj ven-

igis lin en tiun ĉi urbon, kie li faros, ke oni traktu vin respekte, kiel vi meritas... Tia alta poeto, tia granda kapitano! (*Al la Servistoj.*) Rapide! Kion vi tie faras, kiel idiotaj senmovuloj? Servu al ili el la plej bona provizaĵo, kiun vi havas en la gastejo, kaj antaŭ ĉio unu botelon el la plej bona vino, kiun mia mastro volas trinki kun tiuj ĉi kavaliroj kaj tio ĉi estos por li honoro... Kion vi faras tie? Rapidu!

GASTEJMASTRO

Mi iras tuj... El malbona afero mi min tiris! (*Foriras kun la Servistoj al la gastejo.*)

ARLEKENO

Ha, Sinjoro! Kiel danki vin?...

KAPITANO

Kiel pagi al vi?...

KRISPIN

Neniu diru: pagi, ĉar ĝi estas ofenda vorto! Sidiĝu, sidiĝu. Kaj tiel plej fieriĝos mia mastro, ĉe kies tablo kunsidis tiom da princoj kaj altranguloj.

LEANDRO

Vere.

KRISPIN

Mia mastro ŝatas diri malmultajn vortojn; sed tiuj malmultaj estas ĉiuj sentencoj saĝoplenaj.

ARLEKENO

Per ĉio li montras sian grandecon.

KAPITANO

Vi ne scias kiel multe plifortigas nian malviglan spiriton trovi grandan sinjoron, kiel vi, kiu tiamaniere nin konsideras.

KRISPIN

Ĝi estas nenio, ĉar mi scias, ke mia mastro ne kontentiĝas

per tia malmultaĵo kaj estos kapabla konduki vin kun si kaj meti vin en tian altan situacion...

LEANDRO

(Flanken, al Krispin.) Ne tropromesu per vortoj, Krispin...

KRISPIN

Mia mastro ne ŝatas la vortojn, sed vi jam konos lin per liaj faroj.

GASTEJMASTRO

(Eniras kun la Servistoj kiuj portas manĝaĵojn kaj pretigas tablon.) Jen estas la vino... kaj la manĝaĵo.

KRISPIN

Trinku, manĝu kaj prenu el ĉio al vi plaĉanta, mia mastro pagos por ĝi, kaj se io mankas al vi, ne hezitu ĝin postuli, ĉar mia mastro ĉion ordanigos. La gastejmastro estas malzorgema!

GASTEJMASTRO

Tute ne; sed vi komprenos...

KRISPIN

Silentu aŭ vi diros impertinentaĵon.

KAPITANO

Por via sano!

LEANDRO

Por la via, Sinjoroj! Por la plej granda poeto kaj la plej bona soldato!

ARLEKENO

Por la plej nobla Sinjoro!

KAPITANO

Por la plej malavara!

KRISPIN

Kaj mi ankaŭ kuntrinkos, se eĉ tio ŝajnos malrespekto. Por

tiu ĉi tago, el ĉiuj plej granda, kiu kunigis la plej altan poeton, la plej bravan kapitanon, la plej noblan sinjoron kaj la plej lojalan serviston... Kaj permesu, ke mia mastro diru al vi adiaŭ, ĉar la aferoj, venigintaj lin ĉi tien, ne estas prokrasteblaj.

LEANDRO

Vere.

KRISPIN

Ĉu vi ne forgesos prezenti al li ĉiutage viajn komplimentojn?

ARLEKENO

Kaj ĉiuhore: mi kunigos ĉiujn muzikistojn kaj poetojn el mia amikaro por festi lin per muziko kaj kantado.

KAPITANO

Kaj mi venigos mian tutan roton kun torĉoj kaj festlumoj.

LEANDRO

Vi ofendos mian modestecon...

KRISPIN

Kaj nun, manĝu, trinku... Rapide! Servu al tiuj ĉi Sinjoroj. (*Flanken, al la Kapitano.*) Sekrete inter ni... vi ja ne havas monon?

KAPITANO

Ĉu necese certigi ĝin?

KRISPIN

Ne diru plu! (*Al la Gastejmastro.*) He, venu! Vi donos, komisiite de mia mastro kaj en lia nomo, al tiuj ĉi kavaliroj kvardek aŭ kvindek spesmilojn... Ne forgesu plenumi liajn ordonojn!

GASTEJMASTRO

Malzorgu! Ĉu vi diris kvardek aŭ kvindek?

KRISPIN

Nu, donu sesdek... Adiaŭ, kavaliroj!

KAPITANO

Vivu la plej granda kavaliro!

ARLEKENO

Vivu!

KRISPIN

Diru vi ankaŭ: vivu!, malĝentilulaĉoj!

GASTEJMASTRO kaj SERVISTOJ

Vivu!

KRISPIN

Vivu la plej alta poeto kaj la plej granda soldato!

ĈIUJ


Vivu!

LEANDRO

(Flanken al Krispin.) Por kio tiuj ĉi frenezaĵoj, Krispin?
Kiel ni eliros el ili?

KRISPIN

Kiel ni eniris. Vi ja vidas: la Poezio kaj Armeo estas
niaj... Antaŭen! Ni daŭrigu la almilitadon de la mondo! *(Ĉiuj
faras unu al la alia salutojn kaj riverencojn, kaj Leandro kaj
Krispin eliras maldekstren, mezoloken. La Kapitano kaj Arlekeno
pretigas sin elmanĝi la rostaĵojn, kiujn preparis la Gastejmastro
kaj Servistoj, kiuj servas al ili.)*



Ŝ A N Ĝ O

D U A P A R T O

Ĝardeno kun facado de pavilono, kaj trairebla pordo maldekstre, antaŭloke. Estas nokte.

SCENO UNUA

DONJA SIRENO kaj KOLOMBINO, *elirantaj el la pavilono.*

SIRENO

Ĉu ne estas okazo por perdi sian saĝon, Kolombino? Sinjorino, kiel mi, vidanta sin en tia malhonorega premembaraso pro personoj tiel malnoblaj kaj malrespektemaj? Kiel vi kuraĝis reveni al mi kun tiuj diroj?

KOLOMBINO

Ĉu vi, do, devis ne sciigi pri tio?

SIRENO

Morti estus al mi pli bone! Kaj ĉiuj diris al vi same?

KOLOMBINO

Ĉiuj unuope, kiel vi aŭdis ĝin... La tajloro, ke li ne sendos al vi la veston dum vi ne pagos ĉion al li ŝuldatan.

SIRENO

La senhontulo! La atakrabisto de vojirantoj! Kaj li ja ŝuldas al mi sian tutan krediton en tiu ĉi urbo, ĉar ĝis kiam mi okupis lin por mia vestornamiĝo, li ne sciis, kio estas tajlortaŭgi ĉe sinjorinoj!

KOLOMBINO

Kaj la kuiristoj, muzikistoj kaj servistoj, ĉiuj same diris : ke ili ne servos hodiaŭnokte en la festo, se vi antaŭe ne pagos al ili.

SIRENO

La ekzekutistoj ! La friponoj ! Kiam oni vidas tian senhontecon ĉe personoj naskitaj por nin servi ? Ĉu jam oni nur pagas per mono ? Ĉu jam oni nur estimas la monon en la mondo ? Ve al tiu, kiu vidas sin, kiel mi, sen la protekto de edzo, nek parencoj, nek proksimuloj virseksaj !... Ĉar virino sola nenion valoras en mondo, eĉ estante plej nobla kaj virta. Ho tempoj de malsavo ! Ho, Apokalipsaj tempoj ! La antikristo jam devas alveni !

KOLOMBINO

Neniam mi vidis vin tiel senkuraĝan. Mi ne plukonas vin. El pli grandaj premokazoj vi sciis eltiri vin sukcese.

SIRENO

Ĝi estis alia epoko, Kolombino. Tiam mi kalkulis kun mia juneco kaj beleco, kiel multpovaj kunliganoj. Princoj kaj grandaj sinjoroj submetiĝadis je miaj piedoj.

KOLOMBINO

Sanĝe, estus pli malgranda, ol nun, via sperto kaj konatiĝo kun la mondo. Kaj rilate vian belecon, neniam ĝi estis tiel ĝustematura, vi povas kredi tion.

SIRENO

Lasu flataĵojn ! Kiam mi vidus min tiamaniere, se mi estus la dudekjara Donja Sireno !

KOLOMBINO

Ĉu vi diris dudekjara ?

SIRENO

Jes. Kion, do, vi pensis ? Kaj kiel juĝi vin, ankoraŭ ne

dudekjara, kaj nescianta profiti tion? Neniam mi kredis ĝin, kiam vidante min trosola kun servistino, mi adoptis vin, kiel nevinon. Se anstataŭ trofrue pereigi vian junecon, enamiĝante je tiu Arlekeno, je tiu poeto, kiu nenion alian povas proponi al vi, ol versojn kaj vanpromesojn, vi sciis elekti pli taŭgan okupadon, ni ne vidus nin en tia malgaja situacio!

KOLOMBINO

Kiel fari alie? Mi estas ankoraŭ tro juna por rezignacii esti amata kaj ne respondamanta. Se mi devas lertiĝi pri tio, suferigi iun per amo, mi bezonas antaŭe sciiĝi, kiel oni suferas amante. Mi scios rekompensiĝi. Ankoraŭ mi ne atingis dudek jarojn. Ne kredu min tiel sensaĝa, ke mi celu edziniĝi kun Arlekeno.

SIRENO

Mi ne fidus al vi, ĉar vi estas tre kaprica kaj ĉiam lasis vin konduki de la fantazio. Sed ni pensu pri tio, kio nun estas plej grava. Kion ni faros en tiu ĉi granda premembaraso? Ne malfruos alkuri miaj invititoj, ĉiuj personoj gravaj kaj bonrangaj, kaj inter ili Sinjoro Pulĉinelo kun sia edzino kaj filino, kiuj multekauze interesas min pli, ol la ceteraj. Vi ja scias, ke mian domon vizitadas iuj nobelegaj kavaliroj, sed kiel mi, el nobeleco tre malbrilanta pro manko de mono. La filino de Sinjoro Pulĉinelo, kun sia riĉega dotaĵo kaj la granda monhavo, kiun ŝi heredos tuj post la morto de sia patro, povas esti por kiu ajn el ili tre utila edzinakiro. Multaj estas, kiuj pretendas ŝin. Por helpi ĉiujn ilin mi intermetas mian bonan amikecon kun Sinjoro Pulĉinelo kaj lia edzino. Kiu ajn estos la favorato, li certe respondepagos malavare mian helpan intervenon, ĉar ĉiujn mi devigis subskribi garantiaĵan dokumenton. Jam ne restas al mi aliaj rimedoj, ol tiuj ĉi penantaĵoj por restarigi iom mian bienharon; se samokaze iu riĉa negocisto aŭ komercaĵisto enamiĝus je vi... kiu scias?... Ankoraŭ tiu ĉi domo povus refariĝi, kio ĝi estis alitempe. Sed se tiun ĉi nokton oni ekscias kion pretendas tiuj senhontuloj kaj mi ne povas efektivigi la feston... Mi ne volas pensi tion... ĝi estos mia ruiniĝo!

KOLOMBINO

Ne zorgu pri la afero. Ne mankos io por regali la invititojn. Kaj koncerne muzikistojn kaj servantojn, Sinjoro Arlekeno, kiu ial estas poeto kaj por io enamiĝis je mi, scios improvizi ĉion. Li konas multajn bonhumorajn trompulojn, kiuj pretiĝos al ĉio. Estu certa, nenio mankos, kaj viaj invititoj diros, ke ili neniam ĉeestis tian mirindan feston.

SIRENO

Ha, Kolombino! Se estus tiel, kiom vi gajnus ĉe mia amo al vi! Kuru serĉi vian poeton... Oni ne povas perdi tempon.

KOLOMBINO

Ĉu mian poeton? Li, sendube, promenadas trans tiuj ĉi ĝardenoj, atendante ian signon mian...

SIRENO

Ne estos bone, se mi alestos vian intervidiĝon, ĉar mi ne devas malaltigi min petante tiajn favorojn... Mi lasas tion al via zorgo. Manku nenio por la festo kaj mi scios ĉiujn rekompenci, ĉar tiu ĉi nuna prebezzoneco ne povas longe daŭri... aŭ mi ne estus donja Sireno!

KOLOMBINO

Ĉio aranĝiĝos. Iru sen zorgoj. (*Eliras donja Sireno tra la pavilono.*)

SCENO II

KOLOMBINO, *poste KRISPIN venanta el dekstre, mezoloke.*

KOLOMBINO

(*Direktante sin dekstren-mezoloken kaj vokante.*) Arlekeno, Arlekeno! (*Ekvidante Krispin'on enirantan.*) Tio ne estas li!

KRISPIN

Ne timu, bela Kolombino, amata de la plej alta talentulo,

kiu por esti malofita poeto en ĉio ne volis troigi en siaj versoj la laŭdojn pri via beleco. Se inter realaĵo kaj pentraĵo ĉiam estis diferenco, ĉio nun estas supereco de realaĵo, malgraŭ la perfekteco de pentraĵo !

KOLOMBINO

Kaj ĉu vi ankaŭ estas poeto aŭ nur ĝentila flatemulo ?

KRISPIN

Mi estas la plej bona amiko de via amanto Arlekeno, kiu konas min nur de hodiaŭ kaj ricevis en tia mallonga tempo konvinkigajn pruvojn de mia amikeco. Mia plej varma deziro estis vin saluti kaj Sinjoro Arlekeno ne estus komplezinta min tiel diskrete, se li ne tiom fidus al mia amikeco, ĉar sen ĝi tio estus submeti min al la danĝero vin ami, nur donante al mi la okazon vin ekvidi.

KOLOMBINO

Sinjoro Arlekeno fidis tiel multe al la amo, kiun mi sentas, kiel al la amikeco, kiun vi havas al li. Ne metu en vian flankon la tutan meriton, ĉar estas tiel malsaĝa vanteco pardoni vivon al viroj, kiel koron al virinoj.

KRISPIN

Mi rimarkas nun, ke vi ne estas tiel danĝera al tiu vin vidanta, kiel al tiu vin aŭskultinta.

KOLOMBINO

Permesu ; sed antaŭ ol la festo preparita por tiu ĉi nokto mi bezonas paroli kun Sinjoro Arlekeno kaj...

KRISPIN

Ne estas necese. Nur por tio mi venis komisiita de li kaj de mia mastro, kiu kisas viajn manojn.

KOLOMBINO

Kiu estas via majstro, se oni povas sciiĝi ?

KRISPIN

La plej nobla kavaliro, la plej multepova... Permesu, ke nun mi kaŝas lian nomon; vi baldaŭ lin konos. Mia mastro deziras saluti donja Sirenon kaj ĉeesti hodiaŭ ŝian feston.

KOLOMBINO

La festo! Ĉu vi ne scias?...

KRISPIN

Mi scias. Mia devo estas ĉion eltrovi. Mi scias, ke estis kontraŭaĵoj povantaj malhelpi; sed ili ne plu restas, ĉio estas preparita.

KOLOMBINO

Kiel vi scias?...

KRISPIN

Mi certigas vin, ke nenio mankos. Luksega regalakcepto, festolumoj, artaj fajraĵoj, muziko kaj kantistoj. Ĉi estos la plej brila festo el la mondo...

KOLOMBINO

Ĉu eble vi estas iu sorĉisto?

KRISPIN

Vi daŭrigos min konante. Mi nur diros al vi, ke ial hodiaŭ destino kunigis personojn el bonega intelekto, nekapablajn ĝin frupereigi per vantaj skrupuloj. Mia mastro scias, ke hodiaŭ nokte ĉeestos la feston Sinjoro Pulĉinelo, kun sia sola filino, la bela Silvio, la plej bona edzinakiro el tiu ĉi urbo. Mia mastro ŝin enamigos, edziĝos kun ŝi kaj mia mastro scios dece pagi la helpan intervenon de donja Sireno kaj ankaŭ la vian, se vi vin pretigas lin favori.

KOLOMBINO

Vi ne uzas ĉirkaŭdirojn. Via malrespekto devus min ofendi.

KRISPIN

La tempo urĝepremas, kaj ne lasis al mi okazon esti ĝentila.

KOLOMBINO

Se oni juĝos pri la mastro laŭ la servanto...

KRISPIN

Ne timu. Mian mastron vi trovos la plej ĝentila kaj afabla kavaliro. Mia senhonteco permesas al li montri sin hontema. Malmolaj postuloj de la vivo povas devigi la plej noblan kavaliiron agadi kiel senhonorulo, kaj la plej noblan sinjorinon konduti plej malŝatinde, kaj tiu ĉi mikso de malhonesteco kaj nobleco en unu sola persono ŝajnas malĉarma al la mondo. Lerteco estas montri apartigite en du personoj tion, kio kutimas kunesti en unu sola. Mia mastro kaj mi, estante unu sola, ni estas ĉiu unu parto de la alia. Se tiel ĉiam estus! Ĉiuj ni portas ĉe si mem unu grandan sinjoron de malhumilaj pensoj, kapabla pri ĉio granda kaj pri ĉio bela... Kaj apud li la humilan servanton, de malnoblaj agoj, kiu devas sin okupi pri la malŝatindaj faroj, kiujn vivo devigas... La tuta arto estas ilin tiel apartigi, ke falante en ian malnoblaĵon ni povu ĉiam diri: tio ne estas mia, mi ne estis, tio estis mia servanto. En la plej granda mizero de vivo ĉiam estas io ĉe ni, kio volas senti sin supera al ni mem. Ni tro malŝatus nin, se ni ne kredus nin pli valorantaj, ol nia vivo... Vi ja scias, kiu estas mia mastro: tiu de la malhumilaj pensoj, de la belaj revoj. Vi ja scias, kiu mi estas: tiu de la malnoblaj oficoj, kiu ĉiam tre malalte, rampas kaj subfosas ĉe ĉia mensogo, ĉe ĉia malgloro kaj ĉe ĉia mizero. Nur estas io en mi, kio resavas min kaj min altigas al miaj propraj okuloj. Tiu ĉi lojaleco de mia servanteco, tiu ĉi lojaleco, kiu humiligas sin kaj rampadas por ke iu alia povu flugadi kaj ĉiam esti la sinjoro de la malhumilaj pensoj, de la belaj revoj. (*Oni aŭdas muzikon interne.*)

KOLOMBINO

Kia estas tiu muziko?

KRISPIN

La muziko, kiun mia mastro venigis en la feston kun ĉiuj siaj paĝioj kaj ĉiuj siaj servistoj kun plena kortego da poetoj kaj kantistoj prezidataj de Sinjoro Arlekeno kaj plena legio da soldatoj kun ilia Kapitano antaŭe, kiuj eskortas lin kun torĉoj...

KOLOMBINO

Kiu estas via mastro tiel multe povanta? Mi kuras prisciigi mian mastrinon...

KRISPIN

Ne estas necese. Si jen alvenas.

SCENO III

La samaj kaj DONJA SIRENO, kiu venas.

SIRENO

Kio ĝi estas? Kiu preparis tiun muzikon? Kia personamaso alvenas al nia pordo?

KOLOMBINO

Demandu nenion. Eksciu, ke hodiaŭ venis en tiun ĉi urbon granda sinjoro, kaj li estas, kiu proponas al vi la feston tiun ĉi nokton. Lia servisto informos vin pri ĉio. Mi ankoraŭ ne scius kion diri al vi, ĉu mi parolis kun granda frenezulo aŭ kun granda fripono. Kiel ajn mi certigas vin, ke li estas eksterordinara viro...

SIRENO

Tiel, do, ĝi ne estis Arlekeno?...

KOLOMBINO

Ne demandu... Ĉio estas kvazaŭ magia afero...

KRISPIN

Donja Sireno, mia mastro petas vian permeson por kisi al vi la manojn. Tia alta Sinjorino kaj tia nobla Sinjoro ne devas miksi sin kun intrigoj netaŭgaj por ilia bonrango. Tial, antaŭ ol li estos vin salutinta, mi ĉion al vi diros. Mi scias pri via historio mil rimarkiindajn okazintaĵojn kaj ilin raportinte mi certigus vian tutan konfidon al mi... Sed estus impertinente ilin plene priskribi. Mia mastro certigas al vi tie ĉi (*transdonante al ŝi paperon.*) per sia subskribo kion li devos al vi plenumi, se viaflanke vi scios plenumi, kion li tie ĉi proponas al vi.

SIRENO

Kio estas tiu ĉi papero kaj kion li devos plenumi?... (*Legante neparole la paperon.*) Kiel? Cent mil spesmilojn, kiel donacon, kaj aliajn cent mil tuj post morto de Sinjoro Pulĉinelo, se li sukcesas edziĝi kun lia filino? Kiel tiu ĉi senhontaĵo? Al Sinjorino? Ĉu vi scias kun kiu vi parolas? Ĉu vi scias, kia estas tiu ĉi domo?

KRISPIN

Donja Sireno!... Evitu la indignon! Neniu alestas, kiu povas esti grava al vi. Gardu tiun paperon... kune kun aliaj... kaj oni ne plu parolu pri la afero. Mia mastro nenion maldecan proponas al vi, nek vi konsentus... Ĉio, kio okazos ĉi tie, estos faro de hazardo kaj amo. Tio estis mi, la servisto, la sola, kiu ruzartifikis tiujn ĉi malindajn aferojn. Vi ĉiam estas la nobla sinjorino, mia mastro la nobla Sinjoro, kiuj renkontante unu la alian tiun ĉi nokton dum la festo, interparolos pri mil ĝentilaj kaj delikataj aferoj, dum viaj invititoj ĉirkaŭe promenadas kaj parolas, admirante la belecon de la sinjorinoj, la artecon de iliaj festornamoj, la malavaregecon de regalakcepto, la mildecon de muziko kaj la gracion de dancistoj... Kaj kiu kuraĝos diri, ke tio ĉi ne estas ĉio? Ĉu ne tiel estas la vivo, festo en kiu muziko taŭgas por subkaŝi vortojn, kaj vortoj por subkaŝi pensojn? Sonadu senĉese la muziko, animiĝu interparolado per gajaj ekriadoj, estu bone servita noktomanĝo... jen ĉio, kio estas grava

al la invititoj. Kaj jen vidu mian mastron, kiu venas vin asluti plengentile.

SCENO IV

La samaj, LEANDRO, ARLEKENO kaj la KAPITANO, kiuj venas el dekstre, mezoloke.

LEANDRO

Donja Sireno, mi kisas viajn manojn.

SIRENO

Kavaliro...

LEANDRO

Mia servisto estas jam dirinta en mia nomo ĉion, kion mi povus al vi diri.

KRISPIN

Mia mastro, kiel serioza persono, estas malmultevorta. Lia admirado estas muta.

ARLEKENO

Sed li scias saĝe admiri.

KAPITANO

La veran meriton.

ARLEKENO

La veran kuraĝon.

KAPITANO

La nekompareblan poezian arton.

ARLEKENO

La noblan militan sciencon.

KAPITANO

Per ĉio li montras sian grandecon.

ARLEKENO

Li estas la plej nobla kavaliro el la mondo.

KAPITANO

Mia glavo ĉiam estos preta lin servi.

ARLEKENO

Mi dediĉos al lia gloro mian plej bonan poemon.

KRISPIN

Sufiĉe, sufiĉe. Se ne vi ofendos lian naturan modestecon. Vidu, kiel li volus sin kaŝi kaj malaperi. Li estas violo.

SIRENO

Ne bezonas paroli kiu tiamaniere igas ĉiujn paroli lialaŭde. (*Post unu saluto kaj riverenco ĉiuj foriras dekstren, antaŭloken. Al Kolombino.*) Kion vi pensas pri ĉio ĉi tio, Kolombino?

KOLOMBINO

Ke la kavaliro havas tre belan figuron kaj la servisto tre belan senhontecon.

SIRENO

El ĉio oni povas profiti. Aŭ mi nenion scias pri mondo kaj homoj aŭ Fortuno eniris hodiaŭ mian domon.

KOLOMBINO

Estu, do, certa pri Fortuno, ĉar vi ion scias pri mondo kaj pri homoj... ni ne diru!

SIRENO

Risela kaj Laŭra, la unuaj, kiuj alvenas...

KOLOMBINO

Kiam ili estis la lastaj por veni al festo? Mi lasas vin kun ili, ĉar mi ne volas ĉesi observevidi nian kavaliron... (*Eliras dekstren, antaŭloken.*)

SCENO V

DONJA SIRENO, LAŬRA kaj RISELA, venantaj el dekstre mezoloke.

SIRENO

Amikinoj! Mi jam komencis malgajesti pro via neveno.

LAŬRA

Ĉu estas, do, tiel malfrue?

SIRENO

Ĉiam estas malfrue por vin vidi.

RISELA

Aliajn du festojn ni ne ĉeestas por veni al la via.

LAŬRA

Malgraŭ, ke iu diris al ni, ke ĝi ne okazos tiun ĉi nokton, ĉar vi estas iom malsana.

SIRENO

Nur por senpravigi la malbondirantojn, eĉ mortante mi estus ĝin farinta.

RISELA

Kaj ni estus mortintaj kaj ankaŭ venintaj ĝin ĉeesti.

LAŬRA

Ĉu vi nescias la novaĵon?

RISELA

Oni ne parolas pri alia afero.

LAŬRA

Oni diras, ke alvenis mistera gravpersono. Unuj diras, ke li estas sekreta ambasadoro el Venizo aŭ Francujo.

RISELA

Aliaj diras, ke li venas serĉi edzinon por la Sultano de Turkujo.

LAŬRA

Oni certigas, ke li estas bela, kiel Adonis.

RISELA

Se estus al ni eble lin koni... Vi devis inviti lin al via festo.

SIRENO

Ne estis necese, miaj kanaj, ĉar li mem venigis senditon por peti permeson esti akceptata. Li ja estas en mia domo kaj vi tre baldaŭ lin vidos.

LAŬRA

Kion vi diras? Vidu, kiel malerare ni forlasis ĉion por veni al via domo.

RISELA

Kiel multe da virinoj envios nin tiun ĉi nokton!

LAŬRA

Ĉiuj avidas lin ekkoni.

SIRENO

Mi, do, nenion faris por tion atingi. Sufiĉis, ke li ekscias pri la festo en mia domo.

RISELA

Ĉiam okazis al vi same. Ĉiu grava persono alveninta en la urbon, tuj proponas al vi siajn komplimentojn.

LAŬRA

Jam ŝajnas al mi malfrue lin ekvidi... Konduku nin tien, kie li estas, ni petegas.

RISELA

Jes, jes, alkonduka nin.

SIRENO

Permesu, jen venas Sinjoro Pulĉinelo kun sia familio... Iru mem, sen mi; ne estos al vi malfacile paroli kun li.

RISELA

Jes, jes, ni iru, Laŭra.

LAŬRA

Ni iru, Risela. Antaŭ ol kiam pliĝos la amaskonfuzo kaj estos neeble al ni alproksimiĝi. (*Ili eliras dekstren, antaŭloken.*)

SCENO VI

DONJA SIRENO, PULCINELO, SINJORINO PULCINELO kaj
SILVIO, *venantaj el dekstre, mezoloke.*

SIRENO

Ho, Sinjoro Pulcine! Mi jam ektimis, ke vi ne venos. Ĝis nun la festo ne komenciĝis por mi.

PULCINELO

Pri la malfruo mi ne estas kulpa, sed mia edzino, kiu el kvardek vestoj, neniam sciis, kiun surmeti.

S-RINO PULCINELO

Se mi atentus lin, mi prezentigis plej senzorge vestita... Vidu, kiel mi estas sufokiĝinta pro rapido.

SIRENO

Vi venas pli bela, ol ĉiam.

PULCINELO

Nu, ŝi ankoraŭ ne portas la duonon de siaj juveloj. Ŝi ne povus elporti tian pezon.

SIRENO

Kaj kiu pli prave, ol vi, povas fieri, ke lia edzino afektu per la frukto de riĉeco, akirita per via laborado?

S-RINO PULCINELO

Sed, ĉu ne estas jam horo ĝuadi per ĝi, kiel mi diradas al

li, kaj havi pli noblan aspiradon? Figuru al vi, ke li volas nun edzinigi nian filinon kun negocisto.

SIRENO

Ho, Sinjoro Pulĉinelo! Via filino meritas multe pli, ol iun negociston. Oni ne devas pensi pri tio. Vi ne devas oferigi ŝian koron por profito. Kion vi diras, Silvio?

PULĈINELO

Ŝi ja preferos ian belulon, ĉar, tute kontraŭ mi, ŝi estas tre inklinita al romanoj kaj poezio.

SILVIO

Mi ĉiam faros kion mia patro ordonos, se tio ne malplaĉas al mia patrino kaj al mi ne faras malplezuron.

SIRENO

Tio estas saĝe paroli.

S-RINO PULĈINELO

Via patro kredas, ke nur la mono valoras kaj estas estimata en la mondo.

PULĈINELO

Mi kredas, ke sen mono nenio valoras, nek estas estimata en la mondo, ĉar ĝi estas la prezo de ĉio.

SIRENO

Ne parolu tiel! Kaj la virtoj, la scipovo, la nobeleco?

PULĈINELO

Ĉio havas sian prezon, kiu dubas pri tio? Neniu pli bone ol mi ĝin scias, ĉar mi multe da tio akiris kaj ne tre kare.

SIRENO

Ho, Sinjoro Pulĉinelo! Ĝi estas humoraĵo via. Vi bone scias, ke mono ne estas ĉio kaj se via filino enamiĝus je iu nobla kavaliro, ne estus bone, kontraŭstari al ŝi. Mi scias, ke vi havas senteman patrokoron.

PULCINELO

Jes, sendube. Por mia filino mi estus kapabla pri ĉio.

SIRENO

Ĝis via ruiniĝo?

PULCINELO

Tio ne estus pruvo de amo. Preferinde mi estus kapabla forrabi, mortigi... kapabla je ĉio.

SIRENO

Mi ja scias, ke vi ĉiam sciis ree ricegiĝi. Sed la festo animiĝas. Venu kun mi, Silvio. Por danci mi estas difininta al vi iun kavaliron, kun kiu vi faros la plej belan paron... *(Ĉiuj direktas sin dekstren antaŭloken. Kiam Sinjoro Pulcineło estas tuj elironta, lin detenas Krispin, venanta el dekstre, mezoloke.)*

ricegiĝi? aŭ ricegiĝi.

SCENO VII

KRISPIN kaj PULCINELO.

KRISPIN

Sinjoro Pulcineło! Kun permeso.

PULCINELO

Kiu vokas min? Kion vi deziras de mi?

KRISPIN

Ĉu vi ne rememoras pri mi? Ne estas strange. La tempo ĉion forviŝas, kaj kiam forviŝitaĵo estas malplaĉa, eĉ ĝi ne lasas rememore la malneton, sed ĝi rapidas pentri sur ĝi per gajaj koloroj, tiuj gajaj koloroj per kiuj vi kaŝas al la mondo viajn ĝibaĵojn. Sinjoro Pulcineło, kiam mi ekkonis vin, apenaŭ kovris ilin iaj senkolorigitaj ĉifonoj.

PULCINELO

Kiu vi do estas kaj kie vi povis min ekkoni?

KRISPIN

Mi estis knabo, vi jam estis plenviriĝinta. Sed ĉu vi forgesis jam tiom da gloraj heroaĵoj sur la maro, tiom da venkoj gajnitaj al la turkoj, en kiuj ni ne malmulte kunhelpis per nia heroa penado, ambaŭ ni kune ĉe la sama nobela remilo en la sama glora ŝipo?

PULCINELO

Malsaĝulo, silentu aŭ!...

KRISPIN

Aŭ vi faros kun mi, kiel kun via mastro en Neapolo kaj via unua edzino en Bolonio kaj en Venizo kun tiu hebrea komercaĵisto...

PULCINELO

Silentu! Kiu vi estas tiel multe scianta kaj tiel multe babilanta?

KRISPIN

Mi estas... kio vi estis. Kaj mi sukcesos fariĝi, kio vi estas... kiel vi sukcesis. Ne tiel perforte, kiel vi, ĉar la epoko sangiĝis kaj jam sole mortigas la frenezuloj, enamitoj kaj kvar malfe-liĉuloj, kiuj ankoraŭ per armilo surprizatakas la preteriranton en mallumaj stratoj aŭ senhomaj vojoj. Karno el pendo, malŝatinda!

PULCINELO

Kaj kion vi deziras de mi? Monon, ĉu ne vere? Ni jam parolos pli malrapide. Tie ĉi ne estas ĝustloko...

KRISPIN

Ne tremu pri via mono. Mi nur deziras esti via amiko, via kunligano, kiel en tiama tempo.

PULCINELO

Kion mi povas fari por vi?

KRISPIN

Ne, nun mi ja estas, kiu servos vin, kiu volas ŝuldantigi vin per unu averto... (*Igante lin rigardi dekstren, antaŭloken.*) Ĉu vi tie vidas vian filinon dancantan kun juna kavaliro kaj ridetantan ruĝiĝi, ĉar ŝi aŭdas liajn amindumojn? Tiu kavaliro estas mia mastro.

PULCINELO

Via mastro? Li do estas aventuristo, trompulo, bandito, kiel...

KRISPIN

Kiel ni... vi estis tuj dironta? Ne, li estas pli danĝera ol mi, ĉar, kiel vi vidas, lia figuro estas bela, kaj ĉe lia rigardo estas sorĉa mistero kaj mildeco en lia voĉo, kiuj trafas la koron kaj emocias ĝin kvazaŭ li rakontus malgajan historion. Ĉu tio ne sufiĉas por enamigi kiun ajn virinon? Vi ne diros, ke mi ne avertis vin. Kuru, disigu vian filinon de tiu viro kaj ne permesu, ke ŝi redancu kun li, nek iam lin reaŝkultu.

PULCINELO

Li estas via mastro, ĉu tiel vi lin servas?

KRISPIN

Ĉu tio ŝajnas al vi stranga? Ĉu vi forgesis, kiam vi estis servanto? Mi ankoraŭ ne pensas lin perfide mortigi.

PULCINELO

Vi prave diras; mastro estas ĉiam malaminda. Kaj kiun profiton vi celas, min servante?

KRISPIN

Alveni en bonan havenon, kiel ni alvenis tiomfoje kunremante. Tiam vi diris al mi iafoje: «vi, kiu estas forta, remadu por mi»... En tiu ĉi nuna pungalero vi estas pli forta, ol mi; remadu por mi, por la tiama fidelamiko, ĉar la vivo estas tre peza pungalero kaj mi jam longe remadis. (*Eliras dekstren, mezoloken.*)

SCENO VIII

SINJORO PULCINELO, DONJA SIRENO, SINJORINO PULCINELO, *venantaj el dekstre antaŭloke.*

LAŬRA

Nur donja Sireno scias doni tiajn festojn.

RISELA

Kaj la hodiaŭa superis ĉiujn antaŭajn.

SIRENO

La ĉeestado de tiu malofta kavaliro estis nova logilo.

PULCINELO

Kaj Silvio? Kie restis Silvio? Kiel vi lasis mian filinon?

SIRENO

Silentu, Sinjoro Pulĉinelo, ĉar via filino estas plej bone akompanata kaj en mia domo ŝi ĉiam estos sendanĝere.

RISELA

Nur por ŝi estis ĝentilaĵoj.

LAŬRA

Ĉiuj plaĉoj estas por ŝi.

RISELA

Kaj ĉiuj sopiroj.

PULCINELO

El kiu? El tiu mistera kavaliro? Nu, tio ne min kontentigas. Kaj tuj mi...

SIRENO

Sed, Sinjoro Pulĉinelo!

PULCINELO

Lasu, lasu min! Mi scias, kion mi faras! (*Eliras dekstren, antaŭloken.*)

SIRENO

Kio okazas al li? Kial tiu senmoderiĝo?

S-RINO PULCINELO

Ĉu vi vidas, kia viro? Li estos kapabla fari malĝentilaĵon al la kavaliro! Li ja edzinigos sian filinon kun iu komercaĵisto aŭ viro malalteranga! Li ja malfeliĉigos ŝin tutvive!

SIRENO

Tio ne okazos!... Vi estas ŝia patrino kaj iel devas efiki via aŭtoritateco...

S-RINO PULCINELO

Vidu! Li sendube diris ian impertinentaĵon, la kavaliro jam forlasas la manon de Silvio kaj retiriĝas kun la kapo mallevita.

LAŬRA

Kaj ŝajnas, ke S-ro Pulcinele riproĉas vian filinon...

SIRENO

Ni iru, ni iru! Oni ne povas toleri tian tiranecon.

RISELA

Nun ni vidas, Sinjorino Pulcinele, ke viaj multaj riĉaĵoj ne malpliigas vian malfeliĉon.

S-RINO PULCINELO

Vi ne ĉion scias; iafoje li eĉ finis min batante.

LAŬRA

Kion vi diras? Kaj vi estante virino, tion toleris?

S-RINO PULCINELO

Poste, li kredas ripari tion, alportante donacon al mi.

SIRENO

Ne tute malbone! Ĉar estas edzoj, kiuj tion riparas per nenio.
(Ĉiuj eliras dekstren, antaŭloken.)

SCENO IX

LEANDRO kaj KRISPIN, venantaj el dekstre, mezoloke.

KRISPIN

Kial tiu ĉi malĝojo, tiu ĉi senkuraĝeco? Mi kredis trovi vin pli gaja!

LEANDRO

Ĝis nun mi ne vidis min pereantan, nek ĝis nun estis grave al mi perei. Ni forkuru, Krispin, ni forkuru el tiu ĉi urbo, antaŭ ol iu povos nin malkovri kaj oni trafos scii, kio ni estas.

KRISPIN

Se ni forkurus, tiam ja ĉiuj sciis tion kaj multaj kurus kapti nin kaj revenigi nin malvolonte, ĉar ne ŝajnas bone foriri tiel malĝentile, ne dirinte adiaŭ al personoj tiel afablaj.

LEANDRO

Ne moku min, Krispin, mi estas en malespero.

KRISPIN

Tia vi estas! Nun kiam niaj esperoj iras sur plej bona vojo.

LEANDRO

Kion mi povas esperi? Vi volis, ke mi ŝajnigu amon, kaj mi ne povos ĝin ŝajnigi.

KRISPIN

Kial?

LEANDRO

Ĉar mi amas, mi amas plej vere kaj tutkore.

KRISPIN

Ĉu Silvion? Kaj ĉu pri tio vi plendas?

LEANDRO

Neniam mi pensis, ke oni povas ami tiamaniere! Neniam mi pensis, ke mi povos ami! Dum mia vivo vaganta sur ĉiuj vojoj, mi eĉ ne estis la ĉiama preterpasanto, sed la ĉiama forkuranto, por kiu malamiko estas la tero, malamikoj—la homoj, malamiko—la sunlumo. La survoja frukto, ŝtelita, ne donita, ilasis eble sur miaj lipoj ia gusto de amo, kaj iafoje, post multaj malfeliĉaj tagoj, ĉe la nokta ripozo, la sereneco de ĉielo igis min revii pri io, kio estus en mia vivo tia sama, kiel tiu nokta ĉielo, veniganta en mian animon la ripozon de sia sereneco. Kaj tial tiu ĉi nokto dum la festa ĉarmo... ŝajnis al mi ripozo en mia vivo... kaj mi estis revanta... Mi revis! Sed morgaŭ okazos ree la malfeliĉa forkuro, estos la Juĝistoj, kiuj nin persekutas... kaj mi ne volas, ke ili min kaptu tie ĉi, kie ŝi estas, ŝi povas honti, ke ŝi min vidis.

KRISPIN

Mi kredis vidi, ke plaĉas al ŝi vin akcepti... Kaj ne sole mi rimarkis tion. Donja Sireno kaj niaj bonamikoj, la Kapitano kaj la poeto faris al ŝi pri vi la plej grandajn laŭdojn. Al ŝia bonega patrino, Sinjorino Pulĉinelo, kiu nur revas kunparenciĝi kun nobelo, vi ŝajnis la bofilo de ŝiaj iluzioj. Pri Sinjoro Pulĉinelo...

LEANDRO

Li suspektas pri ni..., li konas nin...

KRISPIN

Jes, Sinjoron Pulĉinelon ne estas facile trompi, kiel vulgaran homon. Maljunan ruzulon, kiel li, estas necese trompi lojale. Tial mi kredis plej bona rimedo antaŭsciigi lin pri ĉio.

LEANDRO

Kiel?

KRISPIN

Jes; li konas min de tre longe... Aŭdinte, ke vi estas mia mastro, li prave supozis, ke la mastro estas inda je la servanto.

Kaj mi, respondante al lia konfido, avertis lin, ke li neniel konsentu, ke vi parolu kun lia filino.

LEANDRO

Ĉu tion vi faris? Kion, do, mi povas esperi?

KRISPIN

Malsaĝa vi estas! Ke Sinjoro Pulĉinelo penu ĉiel, ke vi ne revidu lian filinon.

LEANDRO

Mi ne komprenas.

KRISPIN

Tiamaniere li estos nia plej bona samcelano, ĉar sufiĉos, ke li malhelpu, por ke lia edzino kontraŭstaru al li kaj lia filino pli blinde enamiĝu je vi. Vi ne scias, kio estas junulino, filino de riĉulo, edukita plej dorlote, kiam ŝi vidas unuafoje en sia vivo, ke io kontraŭstaras ŝian volon. Mi estas certa, ke ankoraŭ tiun ĉi nokton, antaŭ ol la festo finiĝos, ŝi sukcesos elŝteliĝi el la viglobservado de sia patro por paroli ree kun vi.

LEANDRO

Sed, ĉu vi ne vidas, ke nenio interesas min pri Sinjoro Pulĉinelo kaj pri tuta mondo? Al ŝi, nur al ŝi mi ja ne volas ŝajni neinda kaj malŝatinda... al ŝi mi ne volas mensogi.

KRISPIN

Bah! Forlasu frenezaĵojn! Neeble estas recedi. Pensu, kia sorto atendas nin, se ni hezitas daŭrigi antaŭen. Ĉu vi enamiĝis? Tiu vera amo taŭgos al ni pli bone, ol ŝajnigita. Eble alie vi estus dezirinta trorapidi; kaj se maltimo kaj senhonteco taŭgas por ĉio, nur en amo sidas bone ĉe viro iom da timemo. La timemo de viroj igas pli sentimaj la virinojn. Kaj se vi dubas pri tio, jen vi havas la senkulpan Silvion, kiu alvenas plej sekrete kaj nur atendas por alproksimiĝi al vi, ke mi foriru aŭ min kaŝu.

LEANDRO

Ĉu vi diras Silvion?

KRISPIN

Silentu ! Ŝi povus fortimiĝi. Kaj kiam ŝi restu apud vi, multe da diskreteco... malmultajn vortojn, malmultajn... Adoru, ravrigardu, admiru, kaj lasu paroli por vi la ĉarmon de tiu ĉi azura nokto, favora al amo, kaj tiun muzikon, kies sonoj estingiĝas ĉe la arbaro kaj venas kvazaŭ malgaja pro la festa gajeco.

LEANDRO

Ne moku, Krispin, ne moku tiun ĉi amon, kiu estos mia morto.

KRISPIN

Kial mi primokus ? Mi bone scias, ke ne ĉiam taŭgas rampadi. Ifoje estas necese flugi al ĉielo por el tie pli bone tutvidi la teron. Flugu nun ; mi daŭrigas rampante. La mondo fariĝos nia ! (*Eliras maldekstren, mezoloken.*)

LASTA SCENO

LEANDRO kaj SILVIO, venanta el dekstre antaŭloke. Je la fino KRISPIN.

LEANDRO

Silvio !

SILVIO

Ĉu tio estas vi ? Pardonu ; mi ne kredis trovi vin ĉi tie.

LEANDRO

Mi forkuris el la festo. Ĝia gajeco min malgajigas.

SILVIO

Ĉu ankaŭ vin ?

LEANDRO

Ankaŭ, vi diras ? Ankaŭ vin malgajigas la gajeco !...

SILVIO

Mia patro koleris por mi. Neniam li tiel parolis al mi! Ankaŭ por vi li estis malĝentila. Ĉu vi pardonas lin?

LEANDRO

Jes; mi ĉion pardonas. Sed ne malplaĉu al li pro mia kaŭzo. Reiru al la festo, kie oni vin serĉos, kaj se oni vin trovas ĉi tie apud mi...

SILVIO

Vi estas prava. Sed ankaŭ vi reiru. Kial vi ja estos malgaja?

LEANDRO

Ne; mi foriros rimarkite de neniu... Mi devas iri tre malproksimen.

SILVIO

Kion vi diras? Ĉu gravaj aferoj ne venigis vin en tiun ĉi urbon? Ĉu vi ne devis longe restadi tie ĉi?

LEANDRO

Ne, ne. Eĉ ne unu tagon plu! Eĉ ne unu tagon plu!

SILVIO

Tiel, do, vi mensogis al mi?

LEANDRO

Mensogi! Ne... Ne diru, ke mi mensogis... Ne, ĝi estas la sola vero el mia vivo... Tiu ĉi sonĝo, kiu ne devas havi elvekiĝon! (*Oni aŭdas malproksime la muzikon de kantaĵo ĝis kiam la rulkurteno falas.*)

SILVIO

Tio estas Arlekeno, kiu kantas... Kio okazas al vi. Ĉu vi ploras? Ĉu la muziko igas vin plori? Kial ne diri al mi vian malĝojon?

LEANDRO

Ĉu mian malĝojon? Jam diras ĝin tiu kantaĵo. Aŭskultu ĝin.

SILVIO

El tie ĉi oni nur aŭdas la muzikon; la vortoj perdiĝas. Ĉu vi ne scias ĝin? Ĝi estas kanto al la nokta silento, kaj estas nomita *Regno de animoj*. Ĉu vi ne konas ĝin?

LEANDRO

Ripetu ĝin...

SILVIO

La nokt' amfavora surŝirmas l' amantojn
Per sia ĉiela edziĝo-mantel',
Plej brilajn alkroĉis la nokt' diamantojn
Al sia velur' el somera ĉiel'.

Ĉe l' ombra ĝardeno ne estas koloroj
En tiu mistera malluma ĉi hor',
Susuras la branĉoj, odoras plej floroj
Kaj am' estas milda deziro de plor'.

La voĉ', kiu ĝemas, la voĉo kantanta,
La voĉ', kiun igas vibradi l' amtrem'
En nokt' plej malpie ĝi estas sonanta
Nur kvazaŭ kun preĝoj miksitaj blasfem'.

Anim' de l' silento, la plej eminenta,
Ĉar via silento nur estas la vort',
De kiuj formortis en amo silenta,
De kiuj silentis en ama la mort',

De kiuj, amante nin ege dumvive
Ne sciis esprimi l' amegon al ni.
Ĉu tiu nokt-voĉo nur sonas fiktive,
Kaj amon, eternon, ne diras al mi?

Ĉu, panjo, ne viaj okuloj ellumas
El tiu steleto

Brilanta samkiel larmet' senŝinama
En nokto kun tremo?

Eksciu per vi l' amatin', ke mi amis
Nur vin sur la tero,

Kaj post via morto nur kisis min lumo
De tiu steleto!

LEANDRO

Ho panjo, plej kara ! Mi estas aminta
Nur vin sur la tero,
Kaj post via morto nur kisis min lumo
De tiu steleto !

(Ili restas silente, en ĉirkaŭpremado, rigardante unu la alian.)


KRISPIN

(venanta el maldekstre, mezoloke. Flanken.)

Ho nokt', poezio, frenez' en amantoj !...
Al ni ĉio taŭgos en nuna l' okaz' !
Triumf' estas certa ! Antaŭen ! kuraĝe !
Neniu nin venkos, ĉe ni estas l' am' !

(Silvio kaj Leandro, en ĉirkaŭpremo, direktas sin tre malrapide dekstren, antaŭloken. Nevidate de ili, Krispin ilin sekvas. La kurteno falas tre malrapide.)

FINO DE LA UNUA AKTO



AKTO DUA

TRIA PARTO

Saloneto en la domo de Leandro.

SCENO UNUA

KRISPIN, la KAPITANO, ARLEKENO. *Ili venas el dekstre mezoloke, estas el la koridoro.*

KRISPIN

Eniru, kavaliroj, kaj sidiĝu plej senĝene. Mi diros, ke oni regalu vin per io... He, venu! Venu!

KAPITANO

Neniel. Ni akceptas nenion.

ARLEKENO

Ni venas nur proponi nin al via mastro, ĉar ni eksciis, kio okazis al li.

KAPITANO

Nekredebla perfido, kiu ne restos sen puno! Mi certigas vin, ke se Sinjoro Pulĉinelo lokiĝas je trafebleco de mia mano...

ARLEKENO

Supereco de la poetoj! Li ĉiam estos je trafebleco de miaj versoj... Ho, la timinda satiraĵo, kiun mi pensas dediĉi al li... Malutila maljunulo, malbonfara maljunulo!

KAPITANO

Kaj vi diris, ke via mastro eĉ ne estis vundata?

KRISPIN

Sed li povis esti mortigata. Figuru al vi! Dekduo da dueloj, kiuj subite lin surprizatakis! Dank' al lia braveco, al lia lerteco, al miaj krioj...

ARLEKENO

Ĉu tio okazis hieraŭ vespere, dum via mastro estis parolanta kun Silvio ĉe la ĉirkaŭmuro de ŝia ĝardeno?

KRISPIN

Mia mastro estis jam ricevinta avizon pri tio...; sed vi ja konas lin; li estas viro timigebla per nenio.

KAPITANO

Sed li devis averti min...

ARLEKENO

Li devis averti Sonjoron Kapitanon. Li estus volonte akompaninta lin.

KRISPIN

Vi jam konas mian mastron. Li sola sufiĉas al si.

KAPITANO

Kaj ĉu vi diris, ke vi fine sukcesis kapti je la kolo unu el la malbonuloj, kiu konfesis, ke ĉio estis preparita de Sinjoro Pulĉinelo por liberigi sin je via mastro?...

KRISPIN

Kiu, do, se ne li, povus havi tian intereson? Lia filino amas mian mastron; li penas ŝin edzinigi laŭ sia plaĉo; mia mastro malhelpas lian planon kaj Sinjoro Pulĉinelo ĉiam sciadis, kiel forigi al si malhelpojn. Ĉu li ne vidviĝis dufoje en mallonga tempo? Ĉu li ne heredis samrapide el ĉiuj siaj parencoj maljunaj kaj junaj? Ĉiuj scias pri tio, neniu diros, ke mi lin kalum-

nias... Ha! La riĉeco de Sinjoro Pulĉinelo estas insulto al homaro kaj justeco. Nur inter senhonoruloj povas triumfi tia viro, kiel Sinjoro Pulĉinelo.

ARLEKENO

Vi prave diras... Kaj en mia satiraĵo mi diros ĉion tion... Komprenoble, ne nomante lin, ĉar poezio ne povas permesi al si tion da libereco.

KRISPIN

Sufiĉe grava ŝajnos al li via satiraĵo!

KAPITANO

Lasu, lasu tion al mi, se li nur lokiĝas je trafebleco de mia mano... Sed mi bone scias, ke li ne venos min serĉi.

KRISPIN

Nek mia mastro tolerus, ke oni ofendu Sinjoron Pulĉinelon. Malgraŭ ĉio li estas patro de Silvio. Kio ŝajnas ja grava, tio estas, ke ĉiuj en la urbo eksciuj, kiel mia mastro estis preskaŭ tuj mortigota, kaj ke oni ne povas toleri, ke tiu maljuna vulpo kontraŭstaru al la volo kaj koro de sia filino.

ARLEKENO

Tion oni ne povas toleri; amo estas super ĉio.

KRISPIN

Kaj se mia mastro estus ia malnobla estaĵo... Sed diru al mi, ĉu Sinjoro Pulĉinelo ne devus ja fieri pri tio, ke mia mastro bonvolis enamiĝi je lia filino kaj akcepti lin, kiel bopatron? Mia mastro, malŝatinta tiel multajn knabinojn el altega nobelideco kaj por kiu pli ol kvar princinoj faris kvar mil frenezaĵojn!... Sed, kiu alvenas? (*Rigardante dekstren, mezoloken.*) Ha, Kolombino! Eniru, gracia Kolombino, ne havu timon! (*Eniras Kolombino.*) Ĉiuj ni estas kunamikoj, kaj nia reciproka amikeco ŝirmas vin de nia unuanima admiro.

SCENO II

La samaj kaj KOLOMBINO, kiu venas el dekstre mezoloke, tio estas el la koridoro.

KOLOMBINO

Donja Sireno sendas min peti sciigojn pri via mastro. Apenaŭ ektagiĝis, Silvio venis en nian domon kaj ĉion okazintan raportis al mia mastrino. Ŝi diras, ke ŝi neniam revenos al sia patro kaj nur eliros el la domo de mia mastrino por fariĝi edzino de Sinjoro Leandro.

KRISPIN

Ĉu tion ŝi diras? Ho, nobla junulino! Ho, amanta koro!

ARLEKENO

Kian edziĝokanton mi pensas verki al ili!

KOLOMBINO

Silvio kredas, ke Leandro estas grave vundita... El sia balkono ŝi aŭdis batbruon de glavoj, viajn kriojn helpopetajn. Poste li svene falis kaj senkonscian oni trovis ŝin ektagiĝe. Diru al mi, kio fariĝis al Sinjoro Leandro, ĉar ŝi mortas korpremita pro nescio kaj mia mastrino restis ankaŭ maltrankvila.

KRISPIN

Diru al ŝi, ke mia mastro povis saviĝi, ĉar amo lin gardis, diru al ŝi, ke nur per amo li mortas pro nekuracebla vundo... Diru al ŝi... (*Ekvidante Leandron venantan.*) Ha!... Jen tien ĉi li venas mem, kiu diros al vi, kion mi povus diri.

SCENO III

La samaj kaj LEANDRO, kiu venas el dekstre, antaŭloke.

KAPITANO

(*Ĉirkaŭpremante lin.*) Mia amiko!

ARLEKENO

(*Ĉirkaŭpremante lin.*) Amiko kaj mastro !

KOLOMBINO

Ha, Sinjoro Leandro ! Vi ja estas tutsana ! Kia ĝojo !

LEANDRO

Kiel vi eksciis ?...

KOLOMBINO

En la tuta urbo oni ne parolas pri alia afero ; sur la strato la publiko kolektiĝas en rondetoj kaj ĉiuj malbondiras kaj plendas kontraŭ Sinjoro Pulĉinelo.

LEANDRO

Kion vi diras ?

KAPITANO

Kaj se li ion ree intencus kontraŭ vi !...

ARLEKENO

Kaj se li volus ankoraŭ kontraŭstari al via amo ?

KOLOMBINO

Ĉio estus senefika. Silvio estas ĉe mia mastrino kaj ŝi nur el tie eliros por fariĝi via edzino...

LEANDRO

Ĉu Silvio en via domo ? Kaj ŝia patro...

KOLOMBINO

Sinjoro Pulĉinelo faros tre bone sin kaŝante.

KAPITANO

Li kredis, ke li povas tiom maltimi kun sia insultanta riĉeco !

ARLEKENO

Li povis ĉion maltimi, sed ne la amon...

KOLOMBINO

Pretendi mortigi vin tiel malnoble !

KRISPIN

Dek du duelistoj, dek du... mi kalkulis ilin !

LEANDRO

Mi nur povis ekvidi tri aŭ kvar.

KRISPIN

Mia mastro finos dirante al vi, ke la danĝero ne estis tiel granda por ne fari meritojn el sia sereneco kaj kuraĝo... Sed mi vidis tion ! Dekdu ili estis, dekdu, armitaj ĝis la dentoj, deciditaj pri ĉio. Neeble ŝajnas al mi, ke li sin eltiris kun vivo !

KOLOMBINO

Mi kuras trankviligi Silvion kaj mian mastrinon.

KRISPIN

Aŭskultu, Kolombino. Ĉu ne pli bone, se vi Silvion ne trankviligus ?...

KOLOMBINO

Lasu ĝin je la zorgo de mia mastrino. Silvio kredas en tiu ĉi momento, ke via mastro estas agonianta, kaj kvankam donja Sireno ŝajnigas ŝin deteni... ŝi ne malfruos veni tien ĉi, ĉion malatentante.

KRISPIN

Oni povis antaŭvidi, ke via mastrino pri ĉio zorgis.

KAPITANO

Ni ankaŭ foriru ; ĉar jam per nenio ni povas helpi tie ĉi. Kio taŭgas nun, tio estas subteni la indignon kontraŭ Sinjoro Pulĉinelo.

ARLEKENO

Ni ĵetados ŝtonojn sur lian domon... Ni ribeligos la tutan urbon kontraŭ li... Li eksciuj, ke se ĝis hodiaŭ neniu maltimis

kontraŭ li, hodiaŭ ni ĉiuj kune maltimas; li eksciu, ke en la popolomaso estas spirito kaj konscienco.

KOLOMBINO

Li mem devos veni peti vin, ke vi prenu lian filinon, kiel edzinon.

KRISPIN

Jes, jes; kuru, amikoj. Vidu, ke la vivo de mia mastro ne estas sendanĝera... Kiu unu fojon volis lin perfide mortigi, tiu haltos por nenio.

KAPITANO

Ne timu, Krispin... Kara amiko!

ARLEKENO

Amiko kaj mastro!

KOLOMBINO

Sinjoro Leandro!

LEANDRO

Dank' al ĉiuj, miaj karaj, lojalaj amikoj! (*Ĉiuj foriras, escepte Leandron kaj Krispin'on, dekstren, mezoloken.*)

SCENO IV

LEANDRO kaj KRISPIN.

LEANDRO

Kio ĝi estas, Krispin? Kion vi pretendas? Ĉis kie vi venigos min per viaj artifikoj? Ĉu vi pensas, ke mi kredis ĝin? Vi pagis al la dueloj, ĉio estis aranĝita de vi. Mi ja ne povus esti helpinta al mi kontraŭ ĉiuj ili, se ili ne ŝerce batalus!

KRISPIN

Kaj ĉu vi estos kapabla min riproĉi, kiam mi tiel antaŭvenigas la realiĝon de viaj esperoj?

LEANDRO

Ne, Krispin, ne. Vi ja scias, ke ne! Mi amas Silvion kaj ne atingos ŝian amon per trompoj, kio ajn okazos.

KRISPIN

Vi bone scias, kio okazos al vi... Se ami estas rezignacii perdi kion oni amas pro konsciencaj subtilaĵoj... kiujn Silvio mem ne dankos al vi!...

LEANDRO

Kion vi diras? Se ŝi scius, kiu mi estas!

KRISPIN

Kiam ŝi ĝin ekscios, vi jam ne estos, kiu vi estis; vi estos ŝia edzo, ŝia amanta edzo, tute tiel amanta, fidela kaj nobla, kiel vi volos kaj ŝi povos deziri... Jam ekposedinte sian amon... kaj sian dotaĵon, ĉu vi ne estos la plej perfekta kavaliro? Vi ne estas, kiel Sinjoro Pulĉinelo, kiu kun sia tuta mono permesanta al li tiom da luksaĵoj, li ankoraŭ ne permesis al si la lukson esti honesta... Ĉe li, friponeco estas naturo; sed ĉe vi, ĉe vi ĝi nur estis bezono... Kaj se eĉ vi ne estus min havinta apud vi, vi jam estus vin lasinta morti de malsato pro troa skrupuleco. Ha! Se mi estus trovinta vin alia viro, ĉu vi kredas ke mi estus kontentiĝinta nur per tio, dediĉi vin enamigi?... Ne, mi estus dediĉinta vin al la politiko, kaj ne la mono de Sinjoro Pulĉinelo, la tuta mondo estus fariĝinta nia... Sed vi ne estas ambiciulo, vi kontentiĝas esti feliĉa.

LEANDRO

Sed, ĉu vi ne vidis, ke mi ja ne povis esti ambiciulo? Se mi estus mensoginta por esti tiamaniere amita kaj riĉa, ĝi estus okazinta, ĉar mi ne amus kaj ja ne povus esti feliĉa. Kaj se mi amas, kiel mi povas mensogi?

KRISPIN

Ne mensogu, do. Amu, amu per via tuta koro, multege. Sed defendu vian amon antaŭ ĉio. En amo ne estas mensogi, nediri tion, kio povas perdigi al ni la ŝatatecon de la amata estaĵo.

LEANDRO

Tio ja estas subtilaĵoj, Krispin.

KRISPIN

Kiujn vi devis antaŭe trovi, se via amo estus tia, kiel vi diras. Amo estas nur subtilaĵoj kaj la plej granda el ili ne estas trompi la aliajn, sed trompi sin mem.

LEANDRO

Mi ne povas min trompi, Krispin. Mi ne estas el tiuj viroj, kiuj vendante sian konsciencon, kredas sin en la devo vendi ankaŭ sian intelekton.

KRISPIN

Tial mi diris, ke vi ne taŭgas por politiko. Kaj vi prave diras. Ĉar intelekto estas la konscienco de vero, kaj kiu jam perdis ĝin inter la mensogoj de la vivo, tiu samtroviĝas, kvazaŭ li perdus sin mem, ĉar li neniam plu sin retrovos, nek sin rekonos kaj li mem fariĝos alia mensogo.

LEANDRO

Kie vi dennis tiel multe, Krispin?

KRISPIN

Mi kelkatempe meditadis en pungaleroj, kie tiu ĉi konscienco de mia intelekto akuzis pli min kiel mallertan, ol kiel malhonestan. Kun pli da malhonesto kaj malpli da mallerto anstataŭ remadi en ili, mi estus sukcesinta ilin estradi. Tial mi ĵuris ne reveni al ili en mia vivo... Pensu, pri kio mi ja estos kapabla nun, kiam viakaŭze mi estas preskaŭ tuj romponta mian ĵuron.

LEANDRO

Kion vi diras?

KRISPIN

Ke nia situacio estas jam nesubtenebla, ke ni elfinis nian krediton, kaj ĉiuj komencas jam peti ion efektivan. La Gastejmastro, kiu nin hejmigis malavarege dum multaj tagoj atendas,

ke vi ricevu la kambiojn. Sinjoro Pantalono, kiu fidante al la kredito de la Gastejmaŝtro, liveris al ni ĉion necesan por plej lukse instaligi en tiun ĉi domon... Ĉiuspecaj komercaĵistoj, kiuj ne dubis provizi nin je ĉio, mirblindigitaj de tia grandeco. Donja Sireno, kiu tiel bonhelpan intervenon dediĉis al via amo... Ĉiuj atendis prudente, kaj estus nejuste pretendi pli el ili, nek plendi pri tiaj amindaj personoj... Per oraj literoj restos gravurita en mia koro la nomo de tiu ĉi glora urbo, kiun de nun mi deklaras mia adopta patrino! Krom tio ĉi..., ĉu vi forgesas, ke el aliaj lokoj oni veturis por ni kaj serĉos min? Ĉu vi pensas, ke niaj heroaĵoj en Mantuo kaj en Firenco estas forgeseblaj? Ĉu vi rememoras la faman proceson en Bolonio?... Tri mil du cent foliojn ĝi kunhavis, kiam ni forkuris alarmitaj, ĉar ĝi tiel sensaĝe kreskadas! Kiel ĝi ja estas pliiginta sub la plumo de tiu granda doktorjuristo, kiu prenis ĝin je sia kalkulo? Kiel multe da «konsiderante» kaj «rezultinte» el kiuj ne rezultos io bona! Kaj ĉu vi ankoraŭ dubas? Kaj ĉu vi eĉ niproĉas min, ĉar mi pretigis la batalon, kiu povas en unu sola tago decidigi nian sorton?

LEANDRO

Ni forkuru!

KRISPIN

Ne! Ne plu forkuri malespere! Hodiaŭ nia sukceso fiksigos... Mi donis al vi amon, donu al mi vivon.

LEANDRO

Sed kiel savi nin? Kion mi povas fari? Diru.

KRISPIN

Jam nenion. Sufiĉas per tio, akcepti kion la aliaj proponos al ni... Pensu, ke ni kreis multajn profitojn kaj estas ĉies profito nin savi.

SCENO V

*La samaj kaj DONJA SIRENO, venanta el dekstre, mezoloke, tio estas,
el la koridoro.*

SIRENO

Ĉu vi permesus eniron, sinjoro Leandro?

LEANDRO

Donja Sireno! Vi en mia domo?

SIRENO

Vi ja vidas al kio mi riskas. Tiel multe da langoj malbondiremaj! Mi en la domo de juna kaj beltalia kavaliro!...

KRISPIN

Mia mastro sciis silentigi la malbondirantojn, se iu el ili maltimus suspekti pri via bonfamo.

SIRENO

Ĉu via mastro? Mi ne fidus al tio. La viroj estas tiel vantafektaj! Sed mi nenion rimarkas por vin servi. Kion vi diras al mi, Sinjoro, pri tio, ke hieraŭ nokte oni celis vin mortigi? Oni ne parolas pri alia afero... Kaj Silvio! Kara infanjo! Kiel ŝi amas vin! Mi volus scii, kiel vi faris por ke ŝi vin amu tiamaniere!

KRISPIN

Mia mastro scias, ke ĉion li ŝuldas al via amikeco.

SIRENO

Mi ne diros, ke li ne tre ŝuldas al mi..., ĉar mi ĉiam tiel favorparolis pri vi, kiel mi ne devis, ne konante lin sufiĉe... Mi multe maltimis por via amo. Se nun vi ne plenumus viajn promesojn...

KRISPIN

Ĉu vi dubas pri mia mastro? Ĉu vi ne havas garantiaĵon subskribitan de lia mano?...

SIRENO

Bona mano kaj bona nomo! Ĉu vi pensas, ke ni ĉiuj ne konas unu la alian? Mi scias konfidi kaj mi scias, ke Sinjoro Leandro plenumos ĉion, kiel decas. Sed se vi atentus, ke hodiaŭ estas malfeliĉa tago por mi, kaj por ricevi hodiaŭ duonon da tio, kion oni proponis al mi, mi volonte perdus la alian duonon...

KRISPIN

Ĉu vi diras hodiaŭ?

SIRENO

Tago de ĉagrenoj! Por ke nenio manku, ĝuste hodiaŭ antaŭ dudek jaroj mortis mia dua edzo, kiu estis la unua, la sola amo el mia vivo.

KRISPIN

Tio estu dirita por laŭdo de la unua.

SIRENO

La unua estis altrudita al mi de mia patro. Mi ne amis lin kaj malgraŭ tio, mi sciis esti fidela al li.

KRISPIN

Kion vi ne scios, donja Sireno?

SIRENO

Sed ni lasu rememorojn, kiuj ĉion malgajigas. Ni parolu pri esperoj. Ĉu vi scias, ke Silvio volis veni kun mi?

LEANDRO

En tiun ĉi domon?

SIRENO

Kiel ŝajnas al vi? Kion dirus Sinjoro Pulĉinelo? Kun la tuta urbo animekscitita kontraŭ li, li nepre vin edzigus!

LEANDRO

Ne, ne, malhelpu, ke ŝi venu.

KRISPIN

Silentu ! Vi komprenas, ke mia mastro ne diras kion li sentas.

SIRENO

Mi komprenas. Kion li ja ne donus por vidi apud si Silvion, por neniam disiĝi de ŝi ?

KRISPIN

Kion li donus ? Vi ne scias ĝin !

SIRENO

Tial mi ĝin demandas.

KRISPIN

Ha, donja Sireno !... Se mia mastro hodiaŭ fariĝas edzo de Silvio, hodiaŭ senprokraste li plenumos, kion li promesis al vi.

SIRENO

Kaj se li ne fariĝus ?

KRISPIN

Tiam... vi estos perdinta ĉion. Vidu, kio pli taŭgas al vi.

LEANDRO

Silentu, Krispin ! Sufiĉe ! Mi ne povas toleri, ke mian amon oni traktu, kiel komercaĵon. Eliru, donja Sireno ; diru al Silvio, ke ŝi reiru al sia patro, ke ŝi neniel venu ĉi tien, ke ŝi forgesu min por ĉiam, ĉar mi tuj forkuros tien, kie ŝi ne reekscios pri mia nomo... Mia nomo ! Ĉu mi havas ja nomon ?

KRISPIN

Ĉu vi ne silentos ?

SIRENO

Kio trafis lin ? Kio estas tiu frenezaĵo ? Rekonsciiĝu ! Rezigni tiamaniere tiun grandan feliĉon !... Kaj ne estas la afero nur

pri vi. Pensu, ke iu estas, kiu fidis ĉion al via bonsorto kaj oni ne povas tiel moki bonrangan Sinjorinon, kiu tiel multe riskis por servi vin. Vi ne faros tian frenezaĵon, vi edziĝos kun Silvio aŭ alie, ne mankos kiu postulos de vi klarigon pri viaj trompoj, ĉar mi ne estas tiel sola en la mondo, kiel vi povis kredi, sinjoro Leandro.

KRISPIN

Donja Sireno tre prave parolas. Sed kedu, ke mia mastro nur tiel esprimas sin, ofendita de via malkonfido.

SIRENO

Ĝi ne estas malkonfido al li... ĝi estas, mi ĉion do diros... ĝi estas, ĉar Sinjoro Pulĉinelo ne estas viro, kiu permesas, ke oni lin trompu... kaj pro la ĉiesplendo, kiun vi starigis kontraŭ li per via hieraŭnokta ruzartifiko...

KRISPIN

Ĉu vi diras ruzartifikon?

SIRENO

Bah! Ĉiuj ni konas unu la alian. Sciigu, ke unu el la dueloj estas parenco mia kaj la aliaj tre intimekonataj de mi... Nu, Sinjoro Pulĉinelo tute ne malzorgis, kaj jam oni tradiras en la urbo, ke li priavizis la juĝiston, dirante kiu vi estas kaj kiel oni povas vin pereigi; ankaŭ oni diras, ke iu proceso venis hodiaŭ el Bolonio...

KRISPIN

Kaj kun ĝi diableca doktoro! Trimil naŭcent foliojn...

SIRENO

Ĉion ĉi oni diras, oni certigas... Vidu, ĉu estas ja grave, ne perdi tempon!

KRISPIN

Kaj kiu malbonuzas kaj perdas ĝin, se ne vi? Reiru al via domo... Diru al Silvio...

SIRENO

Silvio estas tie ĉi. Ŝi venis kune kun Kolombino kaj alia servistino el mia sekvantaro. En via antaŭĉambro ŝi atendas. Mi diris al ŝi, ke vi estas gravevundita...

LEANDRO

Ho, mia Silvio!

SIRENO

Ŝi nur pensis, ke vi povas morti... ŝi neniel pensis pri tio, kion ŝi riskas venante vidi vin. Ĉu mi estas via amikino?

KRISPIN

Vi estas adorinda. Rapide. Kuŝigu vin tien ĉi, ŝajnigu vin dolorata, svenanta. Atentu, ke se necese, mi scios fari vin tia efektive. (*Minacante kaj sidigante lin sur seĝegon.*)

LEANDRO

Jes, mi estas via, mi scias, mi vidas tion... Sed Silvio ne estos. Jes, mi volas vidi ŝin; diru, ke ŝi venu, ĉar mi savos ŝin malgraŭ vi, malgraŭ ĉiuj, malgraŭ ŝi mem.

KRISPIN

Vi komprenas, ke mia mastro ne sentas, kion li diras.

SIRENO

Mi ne kredas lin tiel malsaĝa, nek tiel freneza. Venu kun mi. (*Eliras kun Krispin dekstren, mezoloĝen, tio estas tra la koridoro.*)

SCENO VI

LEANDRO kaj SILVIO, venanta el dekstre, mezoloke.

LEANDRO

Silvio! Mia Silvio!

SILVIO

Ĉu vi ne estas vundita?

LEANDRO

Ne; vi ja vidas... Ĝi estis trompo, unu trompo pli por venigi vin ĉi tien. Sed ne timu; via patro venos rapide kaj vi tuj eliros kun li, ne havante ion por riproĉi min... Ho, nur ke mi maldiafanigis la serenecon de via animo per ama iluzio, kiu por vi nur estos rememoro pri malbona sonĝo.

SILVIO

Kion vi diras, Leandro? Ĉu via amo ne estis vero?

LEANDRO

Mia amo, jes... tial ĝi ne vin trompos! Eliru rapide el tie ĉi antaŭ ol iu, krom tiuj, kiuj venigis vin, povos scii, ke vi venis ĉi tien.

SILVIO

Kion vi timas? Ĉu mi ne estas sendanĝere en via domo? Mi ne dubis veni al vi... Kiaj danĝeroj povas minaci min apud vi?

LEANDRO

Nenia, vi prave diras. Mia amo defendas vin de via senkulpeco mem.

SILVIO

Mi ne revenos al mia patro post lia terura faro.

LEANDRO

Ne, Silvio, ne kulpigu vian patron. Tio ne estis li; tio estis alia trompo pli, alia mensogo... Forkuru de mi, forgesu tiun ĉi mizeran aventurulon, kiun juĝistoj persekutas.

SILVIO

Ne, ne estas vero! Tio nur estas, ke la konduto de mia patro igis min neinda je via amo. Tio estas. Mi ĝin komprenas...
Ve al mi!

LEANDRO

Silvio! Mia Silvio! Kiel kruelaj viaj mildaj vortoj! Kiel kruela tiu ĉi nobla konfido de via koro, nescianta pri la malbono kaj la vivo!

SCENO VII

La samaj kaj KRISPIN, ĉiu venas ĉirkaŭe el dekstre, mezoloke.

KRISPIN

Mastro! Mastro! Sinjoro Pulĉinelo alvenas.

SILVIO

Mia patro!

LEANDRO

Estas same! Mi fordonos vin al li per mia propra mano.

KRISPIN

Atentu, ke li ne venas sola, sed kun multaj personoj kaj juĝisto...

LEANDRO

Ha! Se oni trovas vin ĉi tie! Ĉe mi! Sendube vi avizis ilin... Sed vi ne trafos vian celon.

KRISPIN

Ĉu mi? Ne, tute ne... Nun la afero ne estas ŝerca kaj mi jam timas, ke nenio povos nin savi.

LEANDRO

Nin savi, ne; eĉ mi ne intencos tion!... Sed ŝi saviĝos... Estas taŭge vin kaŝi; restu ĉi tie.

SILVIO

Kaj vi?

LEANDRO

Ne timu. Rapidu, ĉar ili alvenas! (*Kaŝas Silvion en la fundan ĉambbron, dirante al Krispin.*) Vi vidos, kio venigas tiujn personojn. Nur zorgu, ke neniu eniru tien ĝis mia reveno... Ne estas alia forkuro. (*Direktas sin al la fenestro.*)

KRISPIN

(*Detenante lin.*) Mastro! Detenu vin! Ne vin mortigu tiel!

LEANDRO

Mi ne pretendas mortigi min, nek forkuri; mi pretendas ŝin savi... (*Grimpas tra la fenestro kaj malaperas.*)

KRISPIN

Mastro, mastro! Ne tiel malbone! Mi kredis, ke li intencas ĵeti sin teren, sed li grimpis... Ni ankoraŭ esperu... Li ankoraŭ volas flugi... Ĝi estas lia regiono, la altaĵoj. Mi al la mia, sur tero... Nun pli ol ĉiam, taŭgas sin alkroĉi al ĝi. (*Tre trankvile sidigas sur seĝegon.*)

SCENO VIII

KRISPIN, SINJORO PULCINELO, *la* GASTEJMASTRO, SINJORO PANTALON, *la* KAPITANO, ARLEKENO, *la* DOKTORO, *la* SEKRETARIO kaj du JUGOSERVISTOJ *kun grandegaj protokoloj el juĝaĵeroj. Ĉiuj venas el dekstre mezoloke, tio estas tra la koridoro.*

PULCINELO

(Interne, al personoj, kiujn oni tie supozas.) Bone gardu la pordojn, neniu eliru, viro aŭ virino, nek hundo, nek kato!

GASTEJMASTRO

Kie estas, kie estas tiuj rabistoj, tiuj mortigistoj?

PANTALON

Justecon! Justecon! Mian monon! Mian monon! *(Ĉiuj viceniras laŭ la montrita ordo. La Doktoro kaj la Sekretario sin direktas al la tablo kaj pretigas sin por skribi. La du juĝoservistoj staras mantene la grandegajn procesajn protokolojn.)*

KAPITANO

Sed, ĉu tio estas ebla, kion ni vidas, Krispin?

ARLEKENO

Ĉu tio estas ebla, kio okazas?

PANTALON

Justecon! Justecon! Mian monon! Mian monon!

GASTEJMASTRO

Oni ilin arestu... oni ilin certe tenu!

PANTALON

Ili ne sin eltiros... ne elsteliĝos!

KRISPIN

Sed, kio estas ĉi tio? Kiel oni transpaŝas tiel perforte la loĝejon de nobela kavaliro? Danku, ke mia mastro ne ĉeestas.

PANTALON

Silentu, silentu, vi estas lia kunhelpanto kaj vi ja pagos kun li!

GASTEJMASTRO

Ĉu kunhelpanto? Ne, tiel kulpa, kiel lia ŝajnanta mastro... ĉar li estas, kiu trompis min.

KAPITANO

Kion signifas ĉi tio, Krispin?

ARLEKENO

Ĉu tiuj ĉi personoj estas pravaj?

PULĈINELO

Kion vi diras nun, Krispin? Ĉu vi pensis, ke viaj ĉikanoj pri mi sukcesos? Mi, do, pretendis mortigi perfide vian mastron? Mi, do, estas avara maljunulo, kiu oferas sian fitinon? La tuta urbo, do, sin minaclevas kontraŭ mi por superŝuti min insulte? Num ni vidos.

PANTALON

Lasu lin, Sinjoro Pulĉinelo, tiu ĉi afero estas nia, ĉar vi fine nenion perdis. Sed mi... tutan mian monon, kiun mi alpruntis sengarantie! Mi troviĝos senhelpa la tutan vivon! Kio estos al mi?

GASTEJMASTRO

Kaj mi, diru, mi, kiu elspezis, kion mi ne havis kaj eĉ mi devis pruntepreni por servi lin, kiel mi kredis decas al lia bonrango? Tio ĉi estas mia detruigo, mia ruino!

KAPITANO

Kaj ni ankaŭ estis malnoble trompataj! Kion oni diros pri mi, kiu metis mian glavon kaj mian kuraĝon por la servo al aventurulo?

ARLEKENO

Kaj pri mi, kiu dediĉis al li sonetojn kaj sonetojn, kiel al plej nobela Sinjoro?

PULCINELO

Ĥa, ĥa, ĥa !

PANTALON

Jes, ridu, ridu !... Ĉar vi nenion perdis...

GASTEJMASTRO

Ĉar oni nenion de vi rabis...

PANTALON

Rapide, rapide ! Kie estas la alia fripono ?

GASTEJMASTRO

Traserĉu ĉion, ĝis oni lin ektrivos.

KRISPIN

Trankvile, Sinjoroj. Se vi antaŭeniras per unu sola paŝo...
(*Minacante per sia glavo.*)

PANTALON

Ĉu ankoraŭ minaci ? Ĉu oni tion toleros ? Justecon, justecon !

GASTEJMASTRO

Jes, justecon !

DOKTORO

Sinjoroj... Se vi ne atentis min, nenion ni atingos. Neniu povas fari al si juĝosolvon per sia propra mano, ĉar la Justeco estas nek perforto, nek venĝo, kaj *sumum jus, summa injuria*. Justeco estas tute saĝeco, kaj saĝeco estas tute ordo, kaj ordo estas tute praveco, kaj praveco estas tute proceduro kaj proceduro estas tute logiko. *Barbara, Celare, Dario, Ferioque, Baralipton*, demetu al mi viajn ofendojn kaj kulpigojn, ĉar ĉio devas kuniĝi al tiu ĉi proceso, kiu venas kun mi.

KRISPIN

Teruro ! Ĝi ankoraŭ kreskis !

DOKTORO

Tie ĉi pruevas aliaj multaj kulpoj de tiuj ĉi viroj, kaj al ili devas aldoniĝi tiu ĉi, pri kiuj vi akuzas ilin kaj mi estos procesanto por ĉiuj ili; nur tiel vi ricevos la decan kontentigon kaj justecon. Skribu, sinjoro Sekretario, kaj sinsekve deklardu la akuzantojn.

PANTALON

Ne metu nin en ĉikanojn, ĉar ni ja bone konas vian justecon.

GASTEJMASTRO

Oni skribu nenion, ĉar tio egalvaloros fari nigra la blankon... Kaj ni restos sen nia mono kaj ili sen puno.

PANTALON

Ĝuste, ĝuste... Mian monon, mian monon! Kaj poste justecon!

DOKTORO

Personoj malkleraj, personoj ignorantaj, personoj senkulturaj! Kian ideon vi havas pri Justeco? Ne sufiĉas, ke vi kredas vin malutilataj, se ne vidiĝos tre klare, ke oni intencis kaŭzi al vi malutilon, aŭ samdire, ke estis trompo aŭ artifiko, kaj ambaŭ aferoj ne estas samaj... kvankam konfuzas ilin la vulgara senco. Sed sciiĝu... ke en unu okazo...

PANTALON

Sufiĉe! Sufiĉe! Vi finos dirante, ke ni estas la kulpuloj.

DOKTORO

Kaj tio ja povus esti, se vi obstinas nei la verecon de la faktoj!...

GASTEJMASTRO

Bela afero! Ni estis rabitaj. Ĉu vi volas pli grandan veron aŭ pli klaran kulpon?

DOKTORO

Sciu, ke rabo ne estas sama afero, ol ŝtelo kaj malpli ankoraŭ ol trompo aŭ artifiko, kiel mi diris unue. Depost la dekdu Moizaj leĝoj ĝis Justiniano, Triboniano, Emiliano kaj Triberiano...

PANTALON

Ĉio nur estis, ke oni lasis nin sen mono... Kaj el tio ĉi neniu nin elirigos.

PULCINELO

Sinjoro Doktoro parolas tre prave. Konfidu al li kaj ĉio pruvenskribiĝu en la proceson.

DOKTORO

Skribu, skribu tuj, Sinjoro Sekretario.

KRISPIN

Ĉu vi volas min aŭdi?

PANTALON

Ne, ne! Silentu la fripono... silentu la senhontulo.

GASTEJMASTRO

Vi jam tie parolos, kie vi restos malvolonte.

DOKTORO

Li jam parolos, kiam venos lia vico, ĉar ĉiuj oni aŭdas por juĝado... Skribu, skribu. En la urbo... la daton... Ne estus malbone unue fari la inventaron el ĉio, kio estas en la domo.

KRISPIN

Li ne donos ripozon al la plumo.

DOKTORO

Kaj ekfari, ke la akuzantoj deponu garantiaĵon, por ke oni ne povu suspekti pri ilia bonfido. Sufiĉos per du mil spesmiloj kontante, kaj kaŭcio de ĉiuj iliaj bienoj...

PANTALON

Kion vi diras? Du mil spesmilojn, ni!

DOKTORO

Ili devus esti okmil; sed sufiĉas ke vi estas personoj iom bonkreditaj por ke ĉion oni atentu, ĉar mi neniam estis nekon- siderema...

GASTEJMASTRO

Haltu! Oni ne skribu plu, ĉar ni ne toleros tion!

DOKTORO

Kiel? Ĉu oni tiel malrespektegas Juĝistaron? Oni komencu apartan proceson por premfaro kaj perforto kontraŭ juĝa Ministro en profesiaj funkcioj.

PANTALON

Tiu ĉi viro nin pereigos!

GASTEJMASTRO

Li estas freneza!

DOKTORO

Ĉu vi diris homon kaj frenezan? Parolu respekte. Skribu, skribu, ke ankaŭ estis parolofendoj...

KRISPIN

Vi tion meritas, ĉar vi ne min aŭskultis.

PANTALON

Parolu, parolu. Kio ajn alia taŭgos al ni pli, laŭ nia konstato.

KRISPIN

Haltigu, do, tiun viron, se ne li levos monton per siaj pa- peraĉoj.

PANTALON

Sufiĉe, jam sufiĉe, ni diras!

GASTEJMASTRO

Lasu la plumon...

DOKTORO

Neniu kuraĝu meti tien ĉi sian manon.

KRISPIN

Sinjoro Kapitano, taŭgu al ni via glavo, kiu estas ankaŭ atributo de justeco.

KAPITANO

(Iras al la tablo kaj tre forte frapas per la glavo sur la paperojn, kiujn estas skribanta la Doktoro.) Faru al ni la favoron ne skribi plu.

DOKTORO

Vidu kiel rapidefikas peti ion prave. Haltigu la enketon, ĉar estas antaŭa demando por klarigi... Parolu ambaŭ pledantoj unu kun la alia... Bone estus dume fari la inventaron...

PANTALON

Ne, ne!

DOKTORO

Ĉi estas neevitebla formalajaŭo.

KRISPIN

Vi jam skribos ĉion necesan. Nun lasu min paroli kun tiuj ĉi honestaj sinjoroj.

DOKTORO

Se estas profite al vi, ke oni skribu atestaĵon pri ĉio, kion vi diros al ili...

KRISPIN

Neniel. Ne skribu eĉ unu literon, aŭ mi neniam parolos.

KAPITANO

Lasu paroli la junulon.

KRISPIN

Kion, do, mi povus diri? Pri kio vi plendas? Ke vi perdis vian monon? Kion vi pretendas? Reakiri ĝin?

PANTALON

Ĝuste, ĝuste ! Mian monon !

GASTEJMASTRO

Nian monon !

KRISPIN

Nu, aŭskultu min ĉi tie, aparte... El kie vi enspezos ĝin, se vi tiel senkreditigas mian mastron kaj tiel nebligas lian edziĝon kun la filino de Sinjoro Pulĉinelo?... Mi ĵuras per... mi ĉiam preferis trakti kun friponoj, ol kun naiveguloj ! Vidu kion vi faris, kaj kiel oni riparos ĝin nun kun interveno de juĝisto. Kion vi atingos nun, se oni prenas nin en pungaleron aŭ pli malbonan lokon ? Ĉu estas bona mono por pagi al vi la ŝirubandoj el nia haŭto ? Ĉu vi estos pli riĉaj, pli nobelaj aŭ pli grandaj, kiam ni estos pereintaj ? Ŝanĝe, se vi ne estus malhelpintaj nin tiel neĝustatempe, hodiaŭ, hodiaŭ senprokraste, vi havus vian monon, kun ĉiuj ĝiaj procentoj... kiuj solaj sufiĉus por konduki vin al pendigilo, se Justeco ne estus en tiuj manoj kaj en tiu plumo... Nun faru tion, kio plaĉas al vi, ĉar mi jam diris al vi, kio estas taŭga...

DOKTORO

Ili restas mirsenmovaj...

KAPITANO

Mi ankoraŭ ne povas kredi, ke ili estas tiel friponaj.

PULĈINELO

Tiu ĉi Krispin... eble estas kapabla ilin konvinki...

PANTALON

(*Al la Gastejmaŝtro.*) Kion vi diras al ĉi tio ? Bone atente...

GASTEJMASTRO

Kion vi diras ?

PANTALON

Vi diras, ke hodiaŭ via mastro estus edziĝinta kun la filino de Sinjoro Pulĉinelo? Kaj se li ne konsentas pri tio?...

KRISPIN

Tio ne malhelpos, ĉar lia filino forkuris kun mia mastro... kaj la tuta urbo ĝin ekscios... Kaj al li estas pli grave, ol al ĉiuj, ke oni ne sciu, ke lia filino malhonorigis por senranga viro, persekutita de juĝistoj.

PANTALON

Se estus tiel... Kion vi diras?

GASTEJMASTRO

Ni ne indulgu. Vidu, ke tiu ĉi friponego estas majstro en mensogado.

PANTALON

Vi prave diras. Mi ne scias, kiel mi povis ekkredi. Justecon! Justecon!

KRISPIN

Atentu, ke ĉion vi perdas!

PANTALON

Ni vidu ankoraŭ... Sinjoro Pulĉinelo, du vortojn.

PULĈINELO

Kion vi volas de mi?

PANTALON

Supozu, ke ni ne estus pravaj por plendi. Supozu, ke Sinjoro Leandro estus ja, la plej nobla kavaliro... nekapabla je malŝatindaj agoj...

PULĈINELO

Kion vi diras?

PANTALON

Supozu, ke via filino amus lin ĝis frenezo, ĝis la ekstremo, esti forkurinta kun li el via domo.

PULCINELO

Ke mia filino forkuris el mia domo kun tia viro? Kiu diris tion? Kiu estis la senhontulo?...

PANTALON

Ne malsereniĝu. Ĉio estas supozita.

PULCINELO

Eĉ supozitan, mi tion ne toleros.

PANTALON

Aŭskultu pacience. Supozu, ke ĉio dirita estus okazinta. Ĉu ne estus al vi nepre ŝin edzinigi?

PULCINELO

Ĉu edzinigi ŝin? Preferinde ŝin mortigi! Sed frenezo estas pensi tion. Kaj mi ja vidas, ke tion vi volus por enspezi je mia kosto, ĉar vi estas aliaj friponoj. Sed ĝi ne estos, ne estos...

PANTALON

Vidu, kion vi diras, kaj oni ne parolu pri friponoj, kie vi ĉeestas.

GASTEJMASTRO

Ĝuste, ĝuste!

PULCINELO

Friponoj, friponoj, kombinitaj por min prirabi! Sed ĝi ne estos, ne estos.

DOKTORO

Ne zorgu pri tio, Sinjoro Pulcinele; eĉ se ili rezignus persekuti lin, ĉu neniel efikus tiu ĉi proceso? Ĉu vi kredas, ke oni ion povas forigi el ĉio, kio rezultas en ĝi, nome kvindek du pruvitaj kaj samkvanto da aliaj, kiuj ne bezonas pruviĝi?...

PANTALON

Kion vi diras nun, Krispin?

KRISPIN

Ke ĉiuj tiuj kulpoj, estante tiel multaj, samefikas kiel tiuj ĉi aliaj... Perdita mono, kiu neniam estos repagita, se ni havas ĝin neniam.

DOKTORO

Ĝi ne estos, ĉar mi enspezos tion, kio koncernas min, kiel ajn ĝi estu.

KRISPIN

Vi, do, enspezos el la mono de la plendintoj, ĉar ni tro faros pagante per niaj personoj.

DOKTORO

La juĝaj enspezoj estas sanktaj, kaj unue mi garantie deprenos por ili ĉion, kio estas en tiu ĉi domo.

PANTALON

Kion vi diras? Tiu garantia depreno estos por pagi al ni iel.

GASTEJMASTRO

Tio estas klara; se alie...

DOKTORO

Skribu, skribu; se ĉiuj parolas, ni neniam interkompreniĝos.

PANTALON kaj GASTEJMASTRO

Ne, ne!

KRISPIN

Aŭskultu min ĉi tie aparte, Sinjoro Doktoro. Kaj se oni pagus al vi per unu fojo sen plua skribado, viajn... kiel vi nomas ilin? Honorariojn?

DOKTORO

Juĝajn porpagojn.

KRISPIN

Kiel vi diras. Kio ŝajnas al vi?

DOKTORO

En tiu okazo...

KRISPIN

Atentu, do, ke mia mastro povas hodiaŭ fariĝi riĉa, multepova, se Sinjoro Pulĉinelo konsentas edzigi lin kun sia filino. Atentu, ke ŝi estas la sola filino de Sinjoro Pulĉinelo; pensu, ke mia mastro estos posedanto de ĉio; pensu...

DOKTORO

Oni povas, oni povas ĝin esplori.

PANTALON

Kion li diris al vi?

GASTEJMASTRO

Kion vi decidis?

DOKTORO

Lasu min pripensi. La junulo ne estas mallerta kaj oni vidas, ke li ne ignoras la leĝajn procedurojn. Ĉar se ni konsideras, ke la ofendo estas nur mona kaj ĉiu kulpo, kiu povas samforme ripariĝi, portas en riparateco la plej justan punon; se ni konsideras, ke tiel en la barbara kaj primitiva leĝo de sambata repuno oni diris: okulon por okulo, denton por dento, sed ne denton por okulo, nek okulon por dento... oni povas je diri en tiu ĉi okazo, spesmilon por spesmilo. Ĉar fine, li ne deprenis de vi la vivon por, ke vi povu postuli repage la lian. Li ne ofendis vin pri via persono, honoro nek bonfamo, por ke vi povu samon postuli. Egaleco estas ĉefsupera justeco. *Equitas justiciam magna est.* Kaj depost la Pandektaj leĝoj ĝis Triboniano kun Emiliano Triboniano...

PANTALON

Ne diru pli. Se li pagus al ni...

GASTEJMASTRO

Se li pagus al ni...

PULĈINELO

Kiel tiuj sensencaĵoj, kaj kiel li pagus, kaj kial trakti nun?...

KRISPIN

Oni traktas pri tio, ke ĉiuj vi partoprenas en la profito savi mian mastron, savi nin por ĉies profito. Vi, por ne perdi vian monon; Sinjoro Doktoro por ne perdi tiun ĉi amason da mirinda doktrino, kiu vi demetadis en tiun pakaĵegon da saĝeco; Sinjoro Kapitano, ĉar ĉiuj vidis lin amiko de mia mastro kaj estas grava afero por lia kuraĝo, ke oni ne malbondiru pri lia amikeco kun aventurulo; vi, Sinjoro Arlekeno, ĉar viaj poetaĵ ditiramboj perdus sian tutan meriton, kiam oni scius, kiel malbone vi ilin uzis; vi, Sinjoro Pulĉinelo... malnova amiko mia, ĉar via filino estas jam por la ĉielo kaj por la mondo la edzino de Sinjoro Leandro.

PULĈINELO

Vi mensogas, vi mensogas! Insultema, senhontulo!

KRISPIN

Oni do ekfaru la inventaron el ĉio, kio estas en la domo. Skribu, skribu, ĉiuj sinjoroj estu atestantoj kaj oni komencu en tiu ĉi ĉambro. (*Detiras la ĥurtenon de la funda pordo kaj aperas, formante grupon, Silvio, Leandro, donja Sireno, Kolombino kaj Sinjorino Pulĉinelo.*)

L A S T A S C E N O

La samaj, SILVIO, LEANDRO, DONJA SIRENO, KOLOMBINO kaj SINJORINO PULCINELO, kiuj aperas ĉe la fundo.

PANTALON kaj GASTEJMASTRO

Silvio !

KAPITANO kaj ARLEKENO

Kune ! Ambaŭ kune !

PULCINELO

Ĝi, do, estis vero ! Ĉiuj kontraŭ mi ! Kaj mia edzino kaj mia filino kun ili ! Ĉiuj kune konspirantaj por min prirabi ! Arestu tiun viron, tiujn virinojn, tiun trompulon, aŭ mi mem... !

PANTALON

Ĉu vi estas freneza, Sinjoro Pulcino ?

LEANDRO

(Venante al antaŭscenejo kune kun la aliaj apudstantaj.)
Via filino venis tien ĉi, kredante min gravevundita, akompanata de donja Sireno, kaj mi tuj iris serĉi vian edzinon, por ke ankaŭ ŝi ŝin akompanu. Silvio scias, kia mi estas, scias mian tutan vivadon da mizeroj, trompoj kaj malnoblaĵoj, kaj mi estas certa, ke el mia ama revo nenio restas en ŝia koro... Forkonduku ŝin, forkonduku ŝin el tie ĉi ; mi petas tion de vi antaŭ ol min fordoni al la juĝisto.

PULCINELO

La puno de mia filino estas je mia kalkulo ; sed pri vi... Arestu lin, mi diras !

SILVIO

Patro ! Se vi ne savos lin, tio estos mia morto. Mi amas lin, mi amas lin ĉiam, nun pli ol iam. Ĉar lia koro estas nobla

kaj li estis malfeliĉa kaj li povis posedi min mensogante, kaj tamen ne mensogis.

PULCINELO

Silentu, silentu, malsaĝa, senhonta! Tio ĉi estas la instruoj de via patrino... ŝiaj ventaĵoj kaj fantaziaĵoj. Tio ĉi estas la legadoj romantikaj, la belaj senefikaĵoj ĉe la lunlumo.

S-RINO PULCINELO

Ĉio pli preferinda estas, ol ke mia filino edziniĝos kun tia viro, kiel vi, por esti malfeliĉa, kiel ŝia patrino. Por kio taŭgis ĉiam al mi la riĉeco?

SIRENO

Vi prave diras, Sinjoro Pulĉinelo. Por kio taŭgas riĉeco sen amo?

KOLOMBINO

Same kiel amo sen riĉeco.

DOKTORO

Sinjoro Pulĉinelo. Nenio estos al vi pli bona, ol kunedzigi ilin.

PANTALON

Vidu, ke tion ĉi oni scios en la urbo.

GASTEJMASTRO

Vidu, ke ĉiuj senescepte opinios favore al ili.

KAPITANO

Kaj ni ja ne toleros, ke vi perfortu la volon de via filino.

DOKTORO

Kaj en la proceso pruvestos, ke oni trovis ŝin tie ĉi kun li.

KRISPIN

Kaj en mia mastro nur estis tiu ĉi difekto: senmoneco, sed neniu superas lin per nobeleco... kaj viaj nepoj estos kavaliroj... se nur ili ne obstinas simili al sia avo...

ĈIUJ

Kunedzigu ilin, kunedzigu!

PANTALON

Aŭ ĉiuj ni saltos sur vin.

GASTEJMASTRO

Kaj via historio elpublikiĝos...

SIRENO

Tion petas de vi Sinjorino, kortuŝita de tiu ĉi amo, tiel nepropa de nuntempo.

KOLOMBINO

Kiu pli ŝajnas romaneca.

ĈIUJ

Kunedzigu ilin, kunedzigu!

PULĈINELO

Ili kunedziĝu malbonhore. Sed mia filino restos sendota kaj senhereda... Kaj mi ruinigos mian tuthavon, antaŭ ol tiu senhontulo...

DOKTORO

Tion vi ja ne faros, Sinjoro Pulĉinelo.

PANTALON

Kiel tiun sensencaĵon?

GASTEJMASTRO

Vi eĉ ne pensu tion!

ARLEKENO

Kion oni dirus!

KAPITANO

Ni ne toleros ĝin!

SILVIO

Ne, patro mia; mi ja estas, kiu nenion akceptas, mi estas, kiu volas plene kunhavi lian sorton. Tiel mi lin amas.

LEANDRO

Kaj tiel nur mi povas akcepti vian amon... (*Ĉiuj kuras al Silvio kaj Leandro.*)

DOKTORO

Kion ili diras? Ĉu ili frenezas?

PANTALON

Tio ne povas esti!

GASTEJMASTRO

Vi ĉion akceptos!

ARLEKENO

Vi estos feliĉaj kaj estos riĉaj.

S-RINO PULCINELO

Mia filino en mizerego! Tiu viro estas ekzekutisto!

SIRENO

Vidu, ke amo estas delikata infano, kiu malmulte kontraŭstaras al malkomforteco.

DOKTORO

Tio ne estos! Ĉar Sinjoro Pulĉinelo subskribos tie ĉi, ke li difinos al ili malavaregan doton, kiel decas al persono liaranga kaj tre amanta patro. Skribu, skribu, Sinjoro Sekretario, al tio ĉi neniu kontraŭstaros.

ĈIUJ

(*escepte Pulĉinelon.*) Skribu, skribu!

DOKTORO

Kaj vi, junaj geamantoj..., resignaciu akcepti la riĉaĵojn, ĉar ne taŭgas krouzi skrupulojn, kiujn dankas neniu.

PANTALON

(Al Krispin.) Ĉu oni pagos al ni?

KRISPIN

Kiu dubas pri tio? Sed vi devos proklami, ke Sinjoro Leandro neniam vin trompis... Vidu, kiel li oferas sin por via kontentigo akceptante tiujn riĉaĵojn, kio mallogas liajn sentojn...

PANTALON

Ĉiam ni kredis lin nobla kavaliro.

GASTEJMASTRO

Ĉiam.

ARLEKENO

Ni ĉiuj kredis tion.

KAPITANO

Ni ĝin subtenos ĉiam.

KRISPIN

Kaj nun, Doktoro, pri tiu proceso, ĉu en la tero estos sufiĉe da tero por entombigi ĝin?

DOKTORO

Mia antaŭzorgo ĉion antaŭvidas. Sufiĉos, se oni faras ĝustan interpunkcion ĉe iaj frazoj... Vidu, ekzemple, tie ĉi oni skribis: «Kaj rezultante ke ne ĉiam li diris la veron...» Sufiĉas unu komo, kaj nun tio signifas: «Kaj rezultante ke ne, ĉiam li diris la veron...» Kaj tie ĉi: «Kaj rezultante ke ne, oni devas lin kondamni...» For la komon, kaj jen la teksto: «Kaj rezultante ke ne oni devas lin kondamni...»

KRISPIN

Ho, mirinda komo! Sorĉefika komo! Genio de Justeco! Orakolo de Leĝo! Koloso de Juroscienco!...

DOKTORO

Nun mi konfidas al la grandanimeco de via mastro.

KRISPIN

Malzorgu. Pli bone, ol vi, neniu scias, kiel la mono povas aliigi viron.

SEKRETARIO

Mi estas, kiu metis kaj forigis tiujn komojn...

KRISPIN

Atendante ion pli bonan... Prenu tiun ĉi ĉenon. Ĝi estas el oro.

SEKRETARIO

Ĉu legitima oro?

KRISPIN

Vi scios pri tio, vi kiu estas kompetenta pri leĝoj...

PULCINELO

Mi nur altrudos unu kondiĉon. Ke tiu ĉi malhonestulo ĉesu por ĉiam esti via servanto.

KRISPIN

Vi ne bezonas peti tion, Sinjoro Pulĉinelo. Ĉu vi pensas, ke mi estas pri ambicio tiel malriĉa, kiel mia mastro?

LEANDRO

Vi, do, volas min lasi, Krispin? Ĝi ne okazos sen malĝojo miaflanke.

KRISPIN

Ne malĝoju, ĉar mi jam ne povas taŭgi al vi por io kaj lasante min vi lasas la maljunulan haŭton... Kion mi diris al vi, mastro? Ke ili ĉiuj kune nin savos... Kredu al tio. Por sukcesi pri ĉio, pli bone ol krei korinklinojn, estas krei profitojn...

LEANDRO

Vi trompiĝas, ĉar sen la amo de Silvio mi neniam estus saviĝinta.

KRISPIN

Ĉu tiu amo estas malgranda profito? Mi ĉiam difinis ĝian parton al idealeco kaj ĉiam kalkulis sur ĝin. Kaj nun la farso finiĝis.

SILVIO

(*Al la publiko.*) Kaj en ĝi vi vidis same, kiel en la farsoj de la vivo, ke tiujn ĉi marionetojn, kiel la homajn, movigas maldelikataj tirkordonetoj, kiuj estas la profitoj, pasietoj, trompoj kaj ĉiuj mizeroj de ilia esteco: iuj kordonetoj detiras iliajn piedojn kaj kondukas ilin al malfeliĉaj okazoj; aliaj detiras iliajn manojn, kiuj malplezure laboras, kolere batalas, ruze forŝtelas, perforte mortigas. Sed inter ili ĉiuj, iafoje el la ĉielo malsupreniras en la koron unu subtila fadeno, kiel teksita per sunlumo kaj lunlumo, la fadeno de amo, kiu la homajn, kiel tiujn ĉi marionetojn ŝajnantajn homecajn, vidigas diajn, kaj venigas al nia frunto krepuskajn brilojn kaj metas flugilojn en nian koron kaj diras al ni, ke ne ĉio estas farso en la farso, ke io dieca estas en nia vivo, kio estas vero kaj estas eterna kaj ne povas finiĝi, kiam la farso finiĝas.

FINO DE LA KOMEDIO

HISPANA ESPERANTO ASOCIO

estas tutlanda organizaĵo por propagandi kaj progresigi ESPERANTON en tuta neŭtraleco politika, socia kaj religia. Ĝi konsistas el individuoj, kiuj, tamen, restas tute absolute liberaj por grupiĝi loke, regione, profesie eĉ ideale, al plej vigla kaj efika propagando kaj progresigo de ESPERANTO en siaj respektivaj kampoj kaj medioj; kaj por tiu vigla kaj efika laboro la Asocio donos ĉian eblan helpon. REKOMENDINDE ESTAS, ke la membroj de la Asocio fondu grupojn eĉ federaciojn el grupoj, kaj same la grupoj kiel la federacioj povas esti ankaŭ membroj de la Asocio kiel se ili estus individuoj.

La kotizo estas DU PESETOJ JARE, sed al la unua oni devas aldoni 50 centimojn el peseto pro la membrokarto; la kotizo donas la membrecon kaj la senpagan oficialan organon «Hispana Esperanto-Gazeto» kaj eldonitajn suplementojn laŭ eblo.

La Asocio celas havigi ankaŭ al la membroj kiel eble plej malmultekoste, kiel ĉi tiun libron,

preskaŭ preskoste, ĉiujn aliajn eldonotajn, elpruvante tiel utilon de sia organizo.

La prezo de la libroj por la membroj de la Asocio estas : por «MIA POEZIO», de Rafaelo San Millán (37 mirindaj poemoj), 50 centimoj el peseto ; por ĉi tiu libro, 75 centimoj el peseto. Por hispanoj ne apartenantaj al la Asocio la prezoj altiĝas al 75 centimoj kaj 1 peseto respektive. FREMDULOJ havigos al si la librojn po 50 kaj 75 centimoj el svisa franko (oni akceptas Respondkuponojn de Universala Esperanto Asocio) ; Grupoj, Asocioj kaj librovendistoj, mendintaj DEK ekzemplerojn el ĉiu verko, trafos TRIONON da rabato. ĈIAM ANTAŬPAGU.

«UNIVERSALA TERMINOLOGIO DE LA ARKITEKTURO» (Arkeologio, Artō, Konstruo k. Metio), de Francisko Azorín (Arkitekto), kun 2.000 desegnoj, kun signifoj en diversaj lingvoj krom la deveno, kaj esperanta klarigo, eldonata kajere (16 paĝa kajero), ABONEBLA po SES SVISAJ FRANKOJ (SES KAJEROJ JAM ELDONITAJ).

ADRESO : Sagasta, 10 (Cruz Roja Española). - MADRID. - HISPANUJO.
